



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Decembro 2019 n-ro: 48



Merhaba,

Aralık 2019, 48 no'lu sayımı ile dergimiz 4 yaşını doldurmuş oluyor... Bu bizim için bir başarı !

Dışarıda her ne kadar da havalar olması gerekenden sıcak geçiyorsa da kış yavaş yavaş yaklaşıyor.

Yılbaşına bir aydan az zaman kaldı. Herkese mutlu sağlıklı bir yeni yıl dileriz !

Bu sayımızda da bir birinden ilginç yazılarla karşınızdayız. Derginin sayfalarını çevirin ve size en ilginç gelen yazıları bulup okuyun. Dili öğrenmekte olan arkadaşlarımız, sizler de basit yazıları okumaya çalışın. Okumadan, yazmadan bir ili öğrenmeniz mümkün değil, o dil Esperanto gibi kolay bir dil olsa bile...

Hepinize iyi okumalar !

Saluton,

Kun nia decembra 2019 48-a numero, nia revueto fariĝas 4 jaraĝa... Ĉi tiu estas sukceso por ni !


Ekstere, kvankam la vetero estas pli varma ol ĝi devas esti kutime, vintro malrapide ja alproksimiĝas.

Ĝis la novjaro restas malpli ol onu monato. Ni bondeziras al ĉiuj feliĉan kaj sanoplenan novan jaron!

En ĉi tiu numero ni prezentas al vi interesajn artikolojn. Trafoliumu nia revueton kaj trovu la plej interesajn tekstojn por ke vi legu ilin. Al nia lernantoj de la lingvo, ni sugestas, ke ili provu legi la plej facilajn tekstojn de nia revueto. Sen legado kaj skribado oni ne povas lerni fremdan lingvon, eĉ se tiu estas facile lernebla lingvo kiel Esperanto...

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:

Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Internacia Beletra Konkurso de Huning Editora (eldonejo)	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Belartaj Konkursoj de UEA: Nova Entuziasmo!	4
Tempo Sigelita	5
FEDRA kaj HIPOLITO (ΦΑΙΔΡΑ και ΙΠΠΟΛΥΤΟΣ)	6
Silikoj	8
Blogo de Surdulo	9
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 19)	10
Dr. Isitobi Kozoŭ (parto 2)	11
Ĉu morto estas reversebla?	12
Ĉu vere ?!	15
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	16
Franco KAFKO (Franz Kafka)	17
Ŝercoj	18
Kurcvortenigmo	18
El la libro de "Dao de Jing" (39)	19
Kolĉiko – Heroldo de la vintro	20
Poeziaĵoj de Ilir Zhiti	21
Kial mi fariĝis esperantisto?	21
Apud Stacidomo Victoria	22
Kelkaj historiaj faktoj	23
Dimanĉa poezio: Antoni Grabowski	24
Lupo kaj Ŝafido	25
Pegazo	25
Tragedio pro la atombomboj	26
Arosev: "La Esperanto-movado pereas"	27
Kirill Ŝvedov: "Direktu la agadon eksteren"	28
La Suna Urbo	29
Libroj estas	29
Ni lernu Esperanton!	31
La certa vojo al la koro de virino	31
Facilaj rakontoj	32
Solvo de la krucvortenigmo	32
...en la Istanbul-a Maratono	32

Kursoj



Finiĝis la kurso de Esperanto en la lernejo Ŭskŭdar Amerikan Lisesi en Istanbul. En somero ne okazos aliaj kursoj.

Murat Ŭzdizdar pensiigis el Ŭskŭdar Amerikan Lisesi lernejo, do ekde venonta jaro la ŝanco daŭrigi EO klubon en ĉi tiu lernejo, bedaŭrinde, estos malalta.

Internacia Beletra Konkurso de Huning Editora (eldonejo)

Ĝenroj: poezio kaj novelo.

Temo: malsato en la mondo.

Poezio, maksimume unu paĝo.

Novelo, maksimume du paĝoj.

Maksimume 2 poemoj kaj/aŭ 2 noveloj.

Papero formato A4, litertipo 12-punkta, en Word aŭ Wordperfekt, en PDF.

Lingvoj: portugala, hispana, Esperanto.

Premioj: 10 premiotaj verkoj (vi eble premiigis per nur unu).

La tuto (en tri lingvoj) eldoniĝos libre en 2020.

Jam sendu biografieton, prefere kun foto.

Lasta sendotago: 28-an de februaro 2020.

Ligilo: www.huningeditora.com.br

Adreso por la sendo:

contato@huningeditora.com.br

Alia adreso: garsi.bays@gmail.com

Informas **Alfredo Gersi Bays** el Brazilio

Se vi havas demandojn, skribu nur al ĉi lasta adreso.



Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj

landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Finiĝis la 60-a Internacia Esperanto-Sumoo kiu okazis inter la 10-a kaj la 24-a de decembro 2019.

La analizoj de la Sumoo ankoraŭ ne estis pretaj dum nia redaktado de la decembra numero de Turka Stelo revuo. Ni ilin publikigos en la posta numero.

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

UEA



N-ro 836 (2019-11-22)
UEA lobiis por Esperanto en la 40a Ĝenerala Konferenco de

Unesko

La 40-a sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko okazis en Parizo de la 12-a ĝis la 27-a de novembro. [...]

N-ro 835 (2019-11-20)

UK 2020: aliĝu dum la unua, plej avantaĝa aliĝperiodo!

Multaj personoj aliĝis al la UK-2020 en Montrealo, Kanado (de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 2020) jam dum la antaŭa UK en Lahtio, kaj nun la aliĝilo disponeblas... [...]

N-ro 834 (2019-11-18)

Mesaĝo al niaj membroj: Festu la Universalan Tagon de la Infano ĉi-merkrede!

La 20-a de novembro estos grava tago: en tiu tago en 1959, do antaŭ precize sesdek jaroj, la Ĝenerala Asembleo de... [...]

N-ro 833 (2019-11-15)

Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago por Toleremo, 16 novembro 2019

En epoko kiam la mondo alfrontas defiojn pli grandajn ol iam ajn antaŭe, kaj kiam demandoj kiel ekzemple klimatsanĝiĝo kaj nuklea milito... [...]

N-ro 832 (2019-11-04)

Unesko-Kuriero havos novan kuneldonanton post publikigo de ĉi tiu numero pri klimata ŝanĝo

La julio-septembra numero de Unesko-Kuriero estis publikigita okaze de la Pinta Kunveno de Unuiĝintaj Nacioj pri Klimata Agado... [...]

TEJO



Partoprenu nome de TEJO Ĝeneralan Asembleon de

UNOY en Nederlando

La Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO serĉas kandidatojn por partopreni la Ĝeneralan Asembleon de UNOY (United Network of Young Peacebuilders) en Nederlando! [...]

TEJO partoprenis eventon pri homaj rajtoj ĉe UN en Ĝenevo


La prezidanto de TEJO Joop Kieft kaj nia oficisto pri Eksteraj Rilatoj Spyros Papadatos partoprenis eventon pri homaj rajtoj ĉe la Alta Komisaro de la Unuiĝintaj Nacioj pri Homaj Rajtoj (UNHCHR) en Ĝenevo. [...]

Iĝu tradukanto de artikoloj pri genro ĉe la gazeto Tutmondaj Voĉoj

TEJO kaj Tutmondaj Voĉoj (Global Voices Esperanto) kunigas fortojn por volontula kunlabora projekto pri tradukado de artikoloj pritemantaj genron. La celo estas krei skipon de tradukantoj kaj provlegantoj por publikigi en Esperanto novaĵojn de la civitana gazeto Tutmondaj Voĉoj. [...]

TEJO serĉas partnerajn organizojn por projekto pri genra egaleco

TEJO serĉas partnerajn organizojn por subvencio de Konsilio de Eŭropo por promocii la batalon kontraŭ seksismo. La projekto devus okazi inter Februaro kaj Septembro 2020 kun financa subvencio de 40000 eŭroj entute. [...]





Leteroj de niaj legantoj



Estimata,
Koran dankon por via bonkoro sendi la belan ĵurnalon!

Mi trovis mian artikolon en ĝi.

Mi audis, ke mia artikolo estus publikigota en decembro.

Do mi surpriziĝis kaj ĝojis vidi tion.

En la venonta volumo ankaŭ mi ĝoje povos vidi la daaŭrigon de mia artikolo.

Mi informos la fakton al d-ro Iŝitobi, la aŭtoro.

Koran dankon!

Kacu Matoba el Japanio



Hola kara,
senlaca, postulema pri la lingvokvalito, varieco de ĝenroj kaj aŭtoroj, belaspekto de revuo, tiel mi povas karakterizi vin, redaktoro de Turka Stelo. Cetere kiel bone, ke la enkonduko de

la revuo aperas dulingve, kio promocias nian internacian lingvon ĉe sampatrujanoj. Dio donu konstantan energion por labori ankaŭ por Esperanto, aparte nuntempe, kiam pluraj indikoj prognozadas ne nur stagnon sed ankaŭ estingiĝon de certaj partoj de nia movado.

Amike

Bardhyl Selimi el Albanio



Karaj,
Mi ŝatas legi "Turka Stelo"-n, kaj mi informis membrojn de Fervojistaj Esperanto-Societo "Mile Veličković" - Niš, Serbio, pri via revueto.

Mi atendas sekvontajn numerojn.

Antaŭdankon,

Nebojša Stanković, el Serbio

Belartaj Konkursoj de UEA: Nova Entuziasmo!

-- el revuo La Lampiro

Literaturo estas gravega elemento en la evolado kaj pluvivado de nia lingvo Esperanto, kaj tio validas ĝis la nuna tempo. Same kiel en la vivo de ĉiu lingvo en la mondo. Tial, la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio de multaj jaroj estas ankaŭ grava iniciato, kiu celas sproni verkemulojn al produktado de valora materialo, kiu pli kaj pli riĉigu nian kulturon. Pluraj elstaraj, famaj aŭtoroj partoprenis en tiu konkurso kaj ricevis premiojn.

La Belartaj Konkursoj funkcias ĉiam lige al la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kiam oni anoncas kaj disdonas la premiojn. En la lastaj jaroj, la respondeco pri tiu grava agado apartenas al du monde konataj hispanoj: Miguel Fernández Martín (prezidanto) kaj Miguel Gutiérrez Adúriz (sekretario). Ĉi tiuj du intelektuloj renovigis la konkurson, aldonis novajn branĉojn kaj transformis la premioceremonion en veran spektaklon. Detalojn oni legu en nia gazetaro kaj en la retejo de UEA. Tio kaŭzis grandan impreson je la publiko, kaj certe estas la kaŭzo, ke en 2019 partoprenis rekorda nombro da konkursantoj: 171 verkoj el 5 kontinentoj.

Unu el la plej interesaj novaj branĉoj estas "Mikronoveloj" (Premio Paula Adúriz). Ĉi tiu moderna speco de literaturajo ŝajne allogis multajn homojn - kiel okazas en la tuta mondo rilate al interesatoj pri literaturo. Mikronovelo estas vere interesa (kaj tute ne facila!) maniero produkti kreopovan tekston. Ĝi postulas regadon de la lingvo, precipe koncerne la kapablon interlinie sugesti pensojn kaj sentojn.

Necesas fakte plena regado de la lingvaj rimedoj.

Jen ĉi tie ni reproduktas la mikronovelon premiitan

en Lahti, Finnlando, en 2019:

Verŝajne

Miaj gepatroj arigis en si ĉiujn homajn kvalitojn. Ili kvazaŭ simbioze kompletigis. Objektive, oni almenaŭ rekonu, ke la evidentan senzorgecon de mia patro kompensis la konata memfido kaj efektiva fidindo de mia patrino.

La someron antaŭ mia naskiĝjaro mia patro maltrafis la starton de alloga krosado, en kiu mia patrino estis pasaĝero. Kun sia valizo en mano kaj memriproĉoj en la okuloj li korŝire konstatis, ke la ŝipo jam nereteneble foriras al la oceano. Kiel konfirmis poste miaj du pliaĝaj gefratoj, se nia patro ne havus tiun fuŝan inklinon maltrafi jen ŝipon, jen nokto-trajnon, jen aviadilon, ni verŝajne ne estus naskitaj.

--oOo--

Vera perla mikrorakonto! La aŭtoro estas Christian Rivière, el Francio. Jen ĉi tiu noto estu incito al brazilaj verkemuloj. Ĉu vi ne emas verki fulman historieton?

Partoprenu en la Belartaj Konkursoj 2020!

de **Paulo Sérgio Viana**, el Brazilio

Fonto: La Lampiro, 60-a jaro, numero 158, 2019:4 P.15-16

MIRAKLO SUR STRATO 34 (1947)

Ni sekvas malaltan maljunulon, kiu marŝas rapide en unu el la stratoj de Novjorko. Li staras antaŭ butikaj montrofenestroj kaj enmiksiĝas en la aranĝlaboro de la butikaj asistantoj. La butikaj asistantoj fiksrigardas al ĉi tiu konfidema viro, kiu provas korekti ĉion. Ĉu li estas freneza aŭ kia?



Poste, nia maljuna heroo venas al la strato, kie kristnaskaj preparadoj estas farantaj en unu granda vendejo nomata Macy. En angulo li vidas viron en kostumo de Sankta Klaŭzo dormanta senrespondece.

"Vi drinkis! (...) Vi devas honti pri vi mem! Ĉu vi ne rimarkas, ke miloj da infanoj enviĉiĝite atendas vidi vin? (...) Vi estas senhonorulo de la kristnaska tradicio, kaj mi ne povas lasi vin malestimi min tiel!"

"... KAJ MI NE POVAS LASI VIN MALESTIMI MIN TIEL!"

Aŭskultu la frazon! Kia ego! Jes, ĉi tiu viro asertas esti Sankta Klaŭzo, kaj la tuta skripto de la filmo sinleviĝas surbaze de ĉi tiu aserto. De komenco ĝis fino...



Li konatiĝas kun Doris Walker (Maureen O'Hara), kiu organizas la kristnaskan eventon de la butikoj. Kaj li iom poste estas dungita al la posteno de la ebria kaj senrespondeca Sankta Klaŭzo.



Ĉi tiu honesta maljunulo dum babilado kun infanoj ne promesas ion, kion li ne povos plenumi. Anstataŭe li sugestas, ke ili iru al alia butikoj. Ĉu vi povas imagi? "Naiva homo kontraŭ kapitalismo!" Sed kapitalistoj ankaŭ ŝatas lin, ĉar patrinaj dankas la butikojn pro la honesteco de tiu Sankta Klaŭzo.

Ĉi tio iras al la oreloj de la butikoj, kiu uzas ĝin kiel taktikon. Fakte la rivalbutikoj ankaŭ komencas uzi la saman taktikon en la sekvantaj tagoj. Vendoj plialtiĝas. Ĉiuj estas tre feliĉaj.

Kris Kringle, t.e. nia Sankta Klaŭzo, jam fariĝas proksimaj amikoj kun Suzan, la filino de Doris kaj ŝia amanto kandidato Fred.



Vi devas spekti la malgrandulinon Natalie Wood en la rolo de Susan. Estis certe, ke ŝi fariĝus bona aktorino jam de tiam. Laŭ la internacia filma datumbazo (imdb) ŝi gajnis la korojn de film-patronoj ĉie en Usono kun la rolo de Susan Walker en ĉi tiu filmo, kaj la filmon oni taksas la plej "kristnaska klasikaĵo" ĝis hodiaŭ.

Bedaŭrinde ĉi tiu bela virino havis malbonan sorton. Ŝi forlasis ĉi tiun mondon en sia 43-a jaraĝo, dum boata travojaĝo, pere de suspektinda morto – ĉu ŝi droniĝis en la maro aŭ ŝi estis murdita? Ŝia edzo Robert Wagner estas ankoraŭ suspektata pro ŝia murdo.

Estas citaĵo de la antikva (342-292 a.K.) helena poeto kaj teatraĵverkisto Menandro (Μένανδρος), kiu, malgraŭ la paso de tiom multaj jarcentoj, restas ĉiam viva, vaste uzata en la nuntempa Grekujo kiel proverbo, popoldiro ŝatata pli multe de la viroj. Temas pri la jeno: "Fajro, Virino, Maro, jen la plej danĝeraj aferoj de la vivo!". Kaj ĉiam restas la demando, ĉu Menandro vere kredis tion aŭ li spritadis tiel kiel la viroj kutimas ĉiam fari, dezirante simpatie mokeki la virinojn? Mi ne scias, tamen mi pensas, ke se mi estus Menandro, mi dirus, ke Fajro, Virino kaj Maro estas la tri plej necesaj aferoj de la vivo, tamen mi povus akcepti, ke ĉiuj tri entenas ideon de danĝero. Mi diras tion, nur ĉar ni ĉiuj bone scias kio okazas, kiam fajro brulas senkontrole, kaj kio okazas, kiam la maro troe ondiĝas kaj leviĝas. Restas al mi diri, kio okazas kiam virina nekontentigita amordeziro eksplodas. Mi parolos pri Fedra!



Fedra estis unu el la filinoj de Minoo (Μίνως aŭ Μίνωας), la potenca reĝo de Kreto (Κρήτη), kaj tiu Minoo estis dum dekoj da jaroj granda malamiko de la Atenanoj, kiujn, dank' al sia tre forta milit-floto, venkis en sinsekvaj militoj, tiel, ke li iĝis kaj longe restis dominanto de la helenaj maroj. Tio daŭris ĝis kiam la tronon de Ateno (Αθήνα) heredis la granda heroo Tezeo (Θησεύς), la vera popolpatro de la Atenanoj, fondinto de la plej glora kaj potenca helena ŝtato. Tezeo iĝis reĝo, kiam li estis ankoraŭ tre juna, fervora, flamema, sentima kaj, ĉefe, benita de la dioj, precipe de Pozidono (Ποσειδών). La granda dio de la maro amis kaj protektis Tezeon, simple ĉar la heroo estis nepo de Pitteo (Πηθείδης), la reĝo de Trizeno (Τροιζήν) kaj ĉar, omaĝe al la granda dio, li estis naskita sur la marbordo de tiu lando kies patrono estis Pozidono.

Post sinsekvaj bravaĵoj kaj venkoportaj militoj, Tezeo iĝis Atenon tre forta, tiel, ke ties malnova, granda malamiko, Kreto, estis devigita akcepti pacinterkonsenton, kiu estis sigelita de edziĝo inter la

tre juna kreta reĝidino, Fedra, kaj la preskaŭ matura jam reĝo de Ateno, Tezeo. Temis pri edziĝo pro konveneco, ne estis amo inter la geedzoj.



Antaŭ jaroj, Tezeo, en tre juna aĝo, estis partopreninta militekspedicion de Heraklo (Ηρακλής) al Ponto (Πόντος) ĉe la malproksima Nigra Maro, kontraŭ la amazonoj, la mond-konataj, temeraj militistinoj. Tre frue estis pruvite ke tiu milito ne estis facila afero, estis milito tre severa kaj longa, ĉar la amazonoj, tre lertaj rajdo-batalantinoj kaj neeraremaj ark-pafistinoj, kuraĝe kontraŭstaris al multenombra armeo el spertaj militistoj. La solvon donis ankoraŭfoje la eroto. Unu el la plej junaj kaj lertaj tiuj militistinoj, la tre bela amazono Antiopa (Αντιόπη) enamiĝis al Tezeo! Ĉu rigardoj de malproksime sufiĉas por okazi tio? Ŝajnas ke jes! Tute simple, la heroo estis tre bela kaj la koro de la junulino soifis viran amon. La unua kiu bone sciis tion, estis Afrodita (Αφροδίτη), la sendorma diino de la amo, kiu, kompreneble, ne povas senemocie observadi tiajn aferojn. Do, ŝajnas ke ŝi faris la geston, ŝi movis la manon kaj la sago de Eroso (Έρως) trapenetris la fortikan kirason kaj ĉian sindetenon kaj heziton de la juna amazono, kiu perfidis kaj forlasis siajn kunulinojn, ŝi helpis Tezeon venke forpuŝi la amazonojn kaj foriris kune kun li al Ateno. Tie, Tezeo, same enamiĝinta al la bela amazono, edziĝis kun ŝi kaj post nelonge li akiris sian unuan infanon, filon al kiu estis donita la nomo Hipolito.

Tamen, la geedza feliĉo ne daŭris longe, ĉar la fieraj kaj militemaj amazonoj ne forgesis la perfidon de Antiopa, la ofendon de Tezeo, ili ne resignaciis je sia humiliga malvenko, do, ili entreprenis la neebulon, ili militiris kontraŭ Atenon! Ili ne nur aŭdacis fari tion, sed post sinsekvaj venkoj ili sukcesis atingi Atikon (Αττική) kaj kaŭzi grandajn damaĝojn al la atena kamparo. Ili eĉ la centran civiton invadis kaj sentime batalis sur la stratoj de la granda urbo kontraŭ la forta armeo de Tezeo. Estis batalo kruela, korpo kontraŭ korpo, ĝi daŭris longe kaj kaŭzis multajn difektojn kaj damaĝojn, la plej granda el kiuj estis la morto de Antiopa, kiu, partopreninte la bataladon kontraŭ siaj malnovaj koleginoj, falis senglore.

Ĉio tio ĉi estis okazinta antaŭ jaroj, do, Tezeo estis vidvo kiam li edziĝis kun Fedra. Lia filo, Hipolito, estis jam viro, iom pli juna ol la nova edzino de Tezeo. Ĉar la avo de Tezeo, Pitteo, la reĝo de Trizeno, estis tre maljuna kaj li ne havis aliajn heredantojn, Hipolito vivis kun li, ĉar estis al li destinite sukcedi la maljunulon kaj post ties morto iĝi reĝo de Trizeno.



Tiu Hipolito estis junulo bela, afabla, ĝentila, tre plaĉa kaj bonkondata, tamen ne ordinara. Ne plaĉis al li la interrilatoj kun multaj homoj, li ne havis amikojn, kamaradojn, kunulojn, li ordinare estis sola kaj liaj plej ŝatataj okupiĝoj estis la gimnastiko kaj la ĉasado. Li pasigis multajn horojn ĉiutage en la gimnastejo aŭ li longe vagadis sur la foraj montaj krutaĵoj, ĉasante sovaĝbestojn. Li estis kaj obstine restis ĉasta kaj tute fidela al la adorado de la diino Artemisa (Ἄρτεμις), la sola virga diino, kiu patronis tiel la ĉasistojn kiel ankaŭ la ĉastulojn. Do, malgraŭ ke li estis tute sana, forta, bela li evitis kontaktojn kaj rilatojn kun la junulinoj, multaj el kiuj montradis al li klare sed vane sian intereson.

En Ateno, Tezeo, post la morto de Antiopa vivis sola, tamen li estis ĉiam okupita pri la senfinaj, gravaj aferoj de la ŝtato pri militaĵoj kaj diversaj politikaj problemoj kaj komplikaĵoj, tiel li havis neoftan kontakton kun sia filo, kiu vivis en Trizeno kaj li ne zorgis persone pri ties edukado.

Kiam Tezeo edziĝis kun Fedra la situacio iom ŝanĝiĝis; kelkan tempon la geedzoj estis kune, ili ĝuis ian feliĉon, kiun freŝigis la tre frua alveno de du filoj. Tamen, tio ne daŭris longe, la multenombraj, ĉiam urĝaj, taskoj de la reĝo ne permesis al li ĝui trankvilan familian vivon, li ne povis, eble ankaŭ ne tute deziris, okupiĝi pri sia juna edzino. Fedra, kiu, kontraŭe an Antiopa, ne interesiĝis pri la aferoj de politiko kaj regado, komencis enui. Tezeo komprenis tion, sed li ne povis forlasi siajn tre seriozajn taskojn, do, kiam li devis foriri por nova, longa ekspedicio, li sendis sian edzinon al Trizeno, ĉe lia avo, por ke ŝi ne estu sola en la palaco de Ateno.

En Trizeno, por la unua fojo Fedra renkontis Hipoliton kaj ŝi tuj admiris la belan vizaĝon, korpon kaj staturon de la junulo. Ŝi provis alproksimiĝi al li, estigi ian parencon rilaton, interparoli kun li, tamen Hipolito montris ofendan indiferentecon, li ĉiamaniere evitis kontakton kun ŝi. Tiu konduto de la junulo devus

memkompreneble kaŭzi la koleron de Fedra, tamen tio ne okazis; tute male, la indiferenteco de Hipolito vekis la intereson de Fedra, kiu komencis kaŝite observi kaj admiri la junulon, kiam li ekzerciĝadis en la gimnastejo.

Tamen, niaj herooj ne estis solaj, neniu homo estas sola kiam la sonoriletoj de la amdeziro komencas vibri. Super ĉio staras la kontrolanto de la kor- kaj korp-deziroj, super ĉio estas la splenda diino de la amo, Afrodita, kiu vekas la amorpasion kaj seksimpulson, kiu zorgas pri la korpa plezuro, pri la kontentigo de la sensoj, ĉar nur tiele estas kaj ĉiam estos en la mondo ĝojo, feliĉo, vivo!

Afrodita, estis kolerinta kontraŭ Tezeo, kiu neglektadis sian belan kaj junan edzinon, kiu preferis la heroajn bravaĵojn ol la varman brakumon de sia amsoifa edzino. Ŝi estis kolerinta ankoraŭ pli multe kontraŭ la ĉasta junulo, kiu ofende rifuzadis la virinan amon, la amon kiun li mem vekis. Do, ĉio kio sekvis estis precipe laboro de Afrodita. Kaj sekvis subita vekiĝo de senbrida amo en la koro de Fedra, kiu komencis pasigadi sian tutan tempon, sopire rigardante la belan junulon, suspirante kaj suferante pro sia pli kaj pli grandiganta neplenumbla amdeziro. La tagoj pasadis rapide, post kelka tempo Tezeo revenus el sia militiro, do, Fedra ne plu povis atendi. Subita interna, nekontrolebla forto puŝis sin al desperplena ago, ŝi aliris al li, ŝi rivelis al li sian enamiĝon, sian pasion, sian ardan amoron, sian voluptan deziron kaj kiam ŝi vidis ke li restas apatia, ŝi petis, petegis, ploris, veis, ŝi tute humiliĝis. Tiam, same nekontrolebla interna forto puŝis Hipoliton al reago ekstrema, li kondutis preskaŭ furioze, per krioj li insultis, li ofendis, li eĉ forte forpuŝis Fedran kun abomeno kaj foriris.

La malbono estis farita, la dia venĝo lasas kompreneble nur viktimojn. Fedra, tute perdinte la sinregadon, preskaŭ freneza pro la malĝojo, la doloro, la humiliĝo, kuris en sian apartamenton, ŝi ligis de plafon-trabo ŝnuron kaj sin ĝismorte pendumis!

Tamen, antaŭe ŝi skribis kaj lasis sur tablo leteron al sia edzo, en kiu ŝi diris, ke Hipolito ŝin atakis, ŝin ofendegis kaj kruise ŝin seks-perfortis, ke pro la granda sia honto kaj ĉagreno, ŝi metas finon al sia vivo!

Kaj ĉar nenio okazas hazarde, ĝuste tiun tagon alvenis Tezeo kaj li estis tiu kiu trovis la pendumitan Fedran, kiu trovis kaj legis la leteron, kiu siavice perdis la rezonkapablon!

Unue li decidis tuj mortigi sian filon per siaj propraj manoj, tamen li ne povis fari tion. La malfeliĉa junulo vane protestadis kaj klopodadis paroli, ion ekspliki al sia patro. Tezeo, en sovaĝa furiozo ordonis lin tuj foriri de la lando. Hipolito povante fari nenion plu, tuj suriris



sur sian grandan, kvarĉevalan ĉaron kaj foriris, dum, Tezeo, daŭre freneza pro ne haltigebla kolero, pro senmezura malĝojo, preĝe alvokadis sian grandan protektanton, Pozidonon, li petadis pri venĝo al la fia, malinda filo.

Kaj jes, la dio de la maro ne povus ne kontentigi la deziron de lia favorato. Tiele, dum kiam la peza ĉaro de Hipolito rapide kuris sur la apudmara vojo kondukanta al Epidaŭro (Επίδαυρος), grandega, sovaĝa, nigra taŭro mirakle elĵetiĝis el la maro. La ĉevaloj forte ektimis, furioziĝis, eksaltis alten, perdis la galopadon, falis, genuiĝis, la ĉaro renversiĝis, kaj la malfeliĉa Hipolito, interplektite de la rimenoj estis longe fortrenita sur la kruta tero, jes, li terure mortis!

La dramo estis tute plenumita kiam la ĉasta Artemisa, tute ne kapabla preventi la ruzecon de Afrodita, eksciis kio okazis al la amata junulo. Ŝi tuj rifuĝis al la helpo de Asklepio (Ασκληπιός), li petis al li, ke li redonu la vivon al Hipolito, tamen, la bonkora dio de la medicino ne povis fari ion, kion Zeŭso (Ζεύς)

ne permesus.

La loĝantoj de Trizeno, kiuj amis Hipoliton kaj sciis ke li estis tute maljuste akuzita kaj punita, estigis al li templojn en kiuj ili adoradis lin kiel dion. Tamen, ankaŭ la dioj honoris lin alimaniere, ili metis lin porĉiame sur la ĉielo, ili faris lin stelo, nu, li estas tie, ĉiam viva kaj brila, li estas la konstelacio Koĉero!

La tuta historio kortuŝis kaj inspiris multajn, grandajn, ĉiafakajn artistojn de ĉiuj epokoj, tiel estas multo da belegaj skrib-verkoj, skulptaĵoj, pentraĵoj, k.c.

La homoj ne povas resti apatiaj kontraŭ tiaj dramoj kaj mi devas reveni al tio, kion mi diris en la komenco de tiu ĉi rakontado, rilate al la danĝero kaŝita ankaŭ en la virino. Tiu ĉi nia historio, sed ankaŭ multaj aliaj, pruvas, ke la venĝo de virino tiele ofendita, de virino kies la amo estas krude kaj humilige rifuzita, estas ja sufiĉe danĝera!

Tamen, mi, persone, opinias tiun venĝon ĝusta kaj justa kaj tio ne nur ĉar mi restas fidela al la principoj metitaj de mia amata Afrodita, sed ankaŭ ĉar mi ĉiam memoras la vortojn de la mond-konata Aleksis Zorbas, la heroo de la granda greka verkisto Nikos Kazanĝakis. Tiu, do, Zorbas diris jenon: "... La bona dio pardonas ĉiujn pekojn, sed ii ne pardonas la viron, kiu rifuzas la amon oferatan al li de enamiĝinta virino; tia krimo estas ja nepardonebla!..."

verkis **Spiros Sarafian** el Grekujo
(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

Silikoj

tradukis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio



Mi konstante plutenas en miajn vestopoŝojn iuj el tiuj silikoj, kiujn mi kolektis desur la kamparaj padoj de l'Ternois, kiam mi promenis ene kun Jacqueline, kaj kies makuloj blankaj sur nigra fono tiom trafte similis vidojn de galaksioj (kaj interstelaj nuboj) en profundprofunda ĉielo. Mi ofte dum tiuj promenadoj levis silikojn de sur la padoj, kaj estinte plurfoje fascinata per tio, mi selektis la plej belajn, kaj ilin

konservis enpoŝe por ilin kontempli kiam plaĉos al mi. Kaj mi pensis, plian fojon, al ĉiuj tiuj miliardoj da steloj, obligitaj per tiuj miloj da galaksioj, tamen reduktitaj je etetaj longaformaj makuletoj en teleskopoj, kiujn nome konsistas el abismoj da miliardaj jaroj, miliardoj da ŝancoj ke estiĝu biologiaj vivoj, pensantaj estaĵoj, civilizoj, personaj destinoj, ĉiuj unikaj, ĉiuj tragikaj, ĉiuj pasiindaj, kaj pasiitaj, kiuj demandas sin, eble, en ĉi-momento la egalajn demandojn, nu, vidu, ktp, ktp. Kaj la kosmeca sento pri riĉeco senlima, sed ankaŭ kunekun, pri vanteco, tuta vantecego, kaj tragikeco de ĉio, de ĉiuj, en « La eterna silento de la spacoj – kaj de eterna nenieco – senlimaj ». Kiuflanke estas la elvorto pri la afero? Aimé Michel (en Vikipedio: http://eo.wikipedia.org/wiki/Aim%C3%A9_MICHEL) scias tion eble nun – aŭ NE scias, jen la tubero...



Tiuj silikoj en miaj poŝoj jen estas ĉio, kio restas

>>19

Dum la lastaj monatoj, mi rimarkis ke multaj homoj alparolas min mallaŭte. Ne temas pri grava afero, ĉar kiam mi ne bone komprenas ilin, mi petas ripeti la demandon kaj solvite.


Tiuj mallaŭtparolemaj homoj estas ĉefe miaj gelernantoj — mi estas muzikinstruisto, do praktikanto de profesio ne tute taŭga por surduloj. Post kelkaj semajnoj tio pensigis min: Ĉu estas vera koluzio kontraŭ mi? Ĉu la gelernantoj interkonsente parolas klasĉambre iom pli mallaŭte ol necese? Kompreneble mi ne estas tiel stulta, kaj post iom da rezonado mi konkludis, ke la kaŭzo sendube kuŝas aliloke, plejcerte pli apude.



Aldone estas ĝenaj genaj trajtoj, kiuj ne multe helpas min: mia avo kaj mia patrino komencis perdi sian aŭdkapablon kiel mezaĝuloj kaj jam de longe ankaŭ mia frato ne aŭdas bone. Timante, ke mi heredis —inter aliajn — ankaŭ tiun “virton”, mi vizitis kuraciston, kiu testis mian aŭdkapablon p e r

e d e mallaŭtaj sonoj senditaj jen al mia dekstra orelo jen al la maldekstra. Post tiu stranga sperto (ĉar

finfine oni jam ne scias, ĉu la sonoj estas realaj aŭ imagataj) venis la otorinolaringologo. Li portis enmane dosieron pri la rezulto de la testo kaj per senindulga voĉo diris: “kara Viktoro, vi jam estas sufiĉe maljuneta...” (li uzas la sufikson “et” ĉie por klopodi mildigeti la diagnozojn). Kompreneble, post tiu frazkomenco, mi antaŭvidis teruran verdikton, sed, li aldonis la jenon: “...kaj vi estas maniulo, kiu diras nur sensecaĵojn: eble vi havas problemon ene de via kapo, sed ne en viaj oreloj, ĉar via aŭdkapablo estas p e r fekta !”. D o m i eliris el la kuracejo kun miksaĵo de sentoj: kompreneble mi ĝojis pro la bona novaĵo, sed mi demandis min mem, ĉu mi devus viziti alian specon de kuracisto por klopodi solvi la “alian” problemon, kiu loĝas miakape.



Tamen la mistero pri tio, kial multaj homoj alparolas min mallaŭte, restas nesolvita, do eble mi devus finfine akcepti, ke mia edzino pravus (denove), kaj la problemo ne estas, ke mi ne bone aŭdas, sed, ke mi ne atente aŭskultas. Pro tio, ŝi aŭguras, ke iom post iom mi iĝos, plie ol surdulo, perfekta surdemulo.

verkis **Viktoro SOLÉ**, Katalunio

Fonto: “La blaga blogo”, revuo Kontakto, #271, 2016:1, p.18

5 >>

Tamen ni memoru ŝin per ĉi tiu feliĉa filmo! Fakte, la tuta filmo estas bildo de feliĉo! En ĉi tiu filmo, skribita kaj direktita de George Seaton estas la optimismo kaj ĝojo de Frank Capra filmoj.

Viro forlasas flegejon, akiras laboron en la fama vendejo Macy, kaj li tamen ne rigardas al tio kiel laborposteno. Ĉar li ne havas dubon, ke li estas Sankta Klaŭzo.

Sed fine, la “freneza psikologo” de la vendejo raportas lin al la juĝejo. Tamen Sinjoro Kris Kringle estas amata de ĉiuj. Alia homo, kiun la psikologo obsedas, estas Alfred, unu el la purigistoj de la vendejo. Alvin Greenman sukcese portretas ĉi tiun naivan, bonkoran infanon kaj li estas la sola aktoro, kiu ankaŭ partoprenis en la 1994 versio de ĉi tiu filmo.

Susan, kiu estas edukita de racia patrino kaj ne kredas je fabeloj, regajnas sian infanaĝon kun Kris Kringle. Ne nur ŝi, sed la tuta Usona komunumo.

Eble la plej amuziga juĝ-proceso en la mondo funkcias por sinjoro Kris Kringle. Ni ne forgesu la juĝiston kaj liaj politikaj celoj! Ĉu li volus konfronti

homon amatan de ĉiuj kaj juĝi kontraŭ li?

Ĉi tiu filmo, kiu datiĝas de la tagoj de Hollywood kaj de la Usona Sonĝo, alportas al ni ventegon de feliĉo kaj rido el la pasinteco.

Brilvizaĝa, aminda, simpatia, maljuna Kris Kingle (Edmund Gwenn) iom similas al la maljunega foto de Victor Hugo.

Sed en ĉi tiu komedio ĉiuj infanaĝaj aŭ plenkreskaj aktoroj sukcesas.

Mi pensis pri multaj filmoj por ĉi tiu decembra numero de Turka Stelo, sed. Sed mi volis verki pri gaja filmo en tempo antaŭ Kristnasko. Mi deziras feliĉan Novjaron kaj Kristnaskon al ĉiuj, kiuj legas nian revuon, ĉu kristanoj aŭ ne.

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal** el Turkujo
26 novembro 2019, Büyükkada, Istanbul

LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)
(daŭrigata)

Oka Ĉapitro

Pasis oktobro kaj komenciĝis la novembraj pluvoj.

De mateno ĝis vespero aŭdiĝis la subitaj pluvegoj, kiuj bruege resaltis sur la pavimon de la korto.

La aero estis varma kaj peza en la apartamentoj.

Nokte, kiam la hejtiloj estingiĝis, la ekstera malsekeco eniris tra la fendoj de la pargeto.

La akra vento blovis sub la feraj kradoj de la estingiĝintaj kamenoj.

Tutajn horojn, sidante antaŭ la fenestro en la senhoma apartamento, Tatjana Ivanovna rigardis la pluvon fali kaj la grandajn gutojn flui sur la vitroj kiel pezaj larmoj.

De unu kuirejo al alia, super la similaj etaj skatoloj de la manĝoŝrankoj, kaj la ŝnuro ŝtrecita inter du najloj, kie sekiĝis la sekigtukoj, la servistinoj interŝanĝis ŝercojn kaj plendojn en tiu rapida lingvo, kiun ŝi ne komprenis.

Ĉirkaŭ la kvara horo, la infanoj revenis de la lernejo. Aŭdiĝis la bruo de la pianoj, kiuj ĉiuj samtempe ludis; kaj en la manĝoĉambroj, similaj lampoj eklumis sur ĉiu tablo.

Oni fermis la kurtenojn antaŭ la fenestroj, kaj aŭdiĝis nur la pluvofrapeto kaj la obtuza murmurego de la stratoj.

Kiel ĉiuj tiuj homoj povas vivi enfermitaj en tiaj nigraj domoj?

Kiam alvenos la neĝo?

Pasis novembro kaj la unuaj decembraj semajnoj apenaŭ pli malvarmaj.

La nebulo, la fumo, la lastaj velkintaj folioj premitaj, kunprenitaj laŭ la stratdefluejoj...

Poste Kristnasko...

La 24an de decembro, post malpeza vespermanĝo rapidege prenita ĉe la tablangulo, la familio Karino foriris al geamikoj por kristnaske festeni.

Tatjana Ivanovna helpis ilin vestiĝi.

Kiam ili adiaŭis antaŭ ol eliri, ŝi havis ĝojmovon

vidante ilin vestitajn kiel antaŭe : Nikolao Aleksandroviĉ kun frako... Ridetante, ŝi rigardis Lulu-n, ŝian blankan robon, ŝiajn longajn plektaĵojn volvitajn sur la nuko.



"Nu, Luliĉka, tiun nokton vi trovos fianĉon, kun la helpo de Dio..."

Lulu silente levis la ŝultrojn, senvorte lasis sin brakumi, kaj ili foriris.

Andreo pasigis siajn kristnaskferiojn en Parizo.

Li surhavis la tunikon, la bluan mallongan pantalonon kaj la kaskedon de la gimnazio de Nico, kies kursojn li ĉeestis.

Li aspektis pli granda kaj pli forta.

Li havis rapidan kaj viglan manieron kvazaŭ li elĵetus la vortojn, kaj la akcenton, la gestojn kaj la slangon de knabo edukata en Francio.

Tiun nokton la unuan fojon li vespereliris kun siaj gepatroj. Li ridis, kantetis.

Tatjana Ivanovna klinis sin tra la fenestro, rigarde sekvis lin dum li iris antaŭ la aliaj kaj saltis super la flakojn.

La pordego refermiĝis kun obtuza ŝokbruo.

Denove Tatjana Irinovna estis sola. Ŝi suspiris.

La vento, milda malgraŭ la sezono, kaj ŝarĝita de maldikaj pluvgutetoj, blovis sur ŝian vizaĝon. Ŝi levis la kapon, senkonscie rigardis la ĉielon. Oni apenaŭ ekvidis inter la tegmentoj iun malluman spacon de stranga ruĝa koloro, kvazaŭ brulantan de interna fajro.

En la domoj, gramofonoj ludis en diversaj etaĝoj misagordajn muzikojn.

Tatjana Ivanova murmuris : " Ĉe ni... " kaj ŝi silentis. Al kio tio utilas? Jam delonge ĉio finiĝis... Ĉio estas finita... mortinta...

Ŝi fermis la fenestron, revenis en la apartamenton. Ŝi levis la kapon, enspiris la aeron kun speco de strebo, kun malkvieta kaj incitita esprimo.

Tiuj malaltaj plafonoj sufokis ŝin.

(daŭrigota)

tradukis MIKELO (Michel Dereyger), el Francio

**“Proponi Trankvilan Morton”
Kiel ni renkontas nian lastan momenton?**

de Dr. Isitobi Kozoŭ

(Kobe ĵurnalo 2019/06/10 08/26:
vespera ĵurnalo, ĉiu sabato)

Dr. Isitobi Kozoŭ naskiĝis en la jaro 1935 en gubernio Hiroŝima, Japanio. En la jaro 2005, li konvertis de la Tokjo Saiseikai Centra Hospitalo kiel kirurga doktoro al la speciala maljuna protektaĵo “Aŝihana Kadukulejo” (Setagaja, Tokjo) kiel regula doktoro. En la jaro 2005, li proponis la trankvilan morton. Poste, li kontinue ekspedas la meriton per diversaj rimedoj de la kadukulejo.

Mi deziras proponi trankvilan morton kiel la ideala rimedo por la fino de la vivo.

(daŭrigata)

3 Terminala kuracado instruita de la familio de enirulo

Kiam mi estas 70 jaroj, mi eklaboris kiel regula doktoro en la speciala maljuna protektaĵo. Tien rifuĝadis 85 jara Alzheimer-demenculino de Mijake-insulo (Izu-Ŝiti-To, Tokjo) pro la eruptio antaŭ 5 jaroj. Ŝia filo jam revenis al la insulo kaj laboris tie. Ian tagon, la virino estis urĝe transportita pro misglutdevena pneŭmonio. Kiam la filo estis rekomendita al ŝi gastrostomion per telefono, li tuj respondis jene: “Doktoro, bonvolu ne operaci ŝin, kiu havas jam sufiĉan jaron. En nia insulo nur akvo estas apude metita, kiam la pacientoj ŝajnas esti en lasta periodo. Se ili havus la forton por vivi, ili mem trinkus la akvon per siaj manoj. Eĉ nur akvo, ili vivus dum kelkaj semajnoj aŭ unu monato.” Li venis de la insulo al la hospitalo kaj vidis patrinon enkondukita nutron tra nazotruo, do li ekploris. Mi eksciis vidante la scenon jene, la kuracio kion ni pensis ĝin natura, estis reflektita al la filo kiel la unuflanka procedo neglektinta homaran dignecon. La pacientino vivis dum ĉirkaŭ 2 jaroj enkondukite nutron perdante konscion. Plie mi havis impresan renkonton. En la familia kunsido de pacientoj, 70 jara viro diris sovaĝe “Vi devas memori kion mi diris antaŭe. Kiam vi ŝanĝas la manĝmanieron por mia edzino?” Li prizorgadis pri la Alzheimer-demencia edzino. La edzo akceptadis ŝin malĝojante pro ŝia malfortaĝo. Post 18 jaraj prizorgado en sia

domo, li konfidis ŝin al la protektaĵo.

Tamen li ne povis konvinkiĝi la manĝmanieron de la funkciuloj, kiu ŝajnis meti la difinitan kvanton de manĝaĵo en ŝian buŝon. La oficisto de la instalaĵo unuflanke pardonis kaj promesis adekvatan aranĝon. Mi komencis paroli ĉion kun geedzoj senkaŝe kaj komprenis jene iom post iom. Ili demandis kiel devas esti la vivfina kuracado en la grandaĝula mondo.



4 Mi admiris renkonti kun natura forpaso

Mi antaŭe skribis pri la viro, kiu koleris pri manĝigi difinitan kvanton al lia kadukeca edzino. Lia maltrankvilo realiĝis kaj lia edzino estis urĝe transportita al hospitalo pro misgluto. Li rifuzis la gastrostomion rekomenditan al ŝi. Post la geedzoj diskutis kun mi, ili decidis reveni al la kadukulejo. Li komencis la atenteman manĝhelpon al sia edzino. Li donis al ŝi kvanton da manĝaĵo laŭ ŝia ŝato. La funkciuloj en la instalaĵo ankaŭ kunlaboris. Kontraŭ nia supozo la edzino vivis ankoraŭ pli unu jaro kaj duono per limigita manĝaĵo. En la lasta stadio ŝi ne trinkis eĉ akvon, kaj post 2 semajnoj ŝi mortis kvazaŭ dormante. Mi unua foje renkontis kun la natura forpaso. Mi admiris. Tiel oni povus morti trankvile se nenio estus farita! La mekanismo de la glora natura morto devas esti la beno de Dio, mi pensis. La viro de Mijake-insulo jam menciita instruis min la tradician pensadon “Morto ne venas de nemanĝado, sed nemanĝado venas de morto.” Tiu ĉi vero ekzistas ankaŭ en tiu ĉi okazo, mi komprenis. Kiam mi eklaboris en la kadukulejo pensinte ke la enirulo mortos suferante, mi aranĝis medicinan opiaĵon kun kooperita hospitalo. Tamen mi neniam uzis ĝin. En la okazo de natura forpaso, natura anestezo ŝajnas funkcii. Ne manĝante pli kaj pli, ne akceptante nutron aŭ eĉ akvon, dormante kaj dormante, la paciento forpasas nesuferante. Mi pensas, ke ne manĝanti celus al ĉieliro malpeziginte korpon ĵetante senutilaĵon. Preskaŭ akvo ne estas prenata, urino estas ĵetita. Kiel regula doktoro mi vidis la vivon kaj forpason de la eniruloj, kaj nomiĝis la kadukecan kaj naturan morton kiel trankvilan morton.

(daŭrigota)

tradukis kaj sendis **Kacu Matoba** el Japanio

Eksperimento, kiu parte revivigis la cerbon de buĉitaj porkoj, levas demandojn pri la preciza fina punkto de la vivo

de Christof Koch la 1-an de oktobro 2019

MALLONGE

- Morto havis ŝanĝiĝantan difinon dum jarmiloj. Origine, ĝi signifis ĉeson de spirado kaj halton de koro.
- La alveno de mekanikaj ventoliloj (spiradmaŝino) movis la lokiĝon de morto al la cerbo —morto fariĝis perdo de cerba funkcio, nereversebla komo.
- Parta reviviĝo de porka cerbo, horojn post senkapigo, kiu pruviĝis en lastatempa eksperimento, povus denove renversi la difinon de morto.

“Kaj morto ne havu regadon”

— Dylan Thomas, 1933

Vi mortos, pli frue aŭ pli malfrue. Ni ĉiuj mortos. Ĉar ĉio, kio havas komencon, havas ankaŭ finon, tio estas la netuŝebla konsekvenco de la dua leĝo de termodinamiko.

Malmultaj el ni ŝatas pensi pri ĉi tiu turmentiga vero. Sed jam naskita, la penso pri malkonscio ne povas entute esti forviŝita. Ĝi kaŝiĝas en la nekonsciaj ombroj de nia menso, preta por eksplodi. En mia kazo, mi nur kiel matura homo fariĝis plene mortema. Mi iam malŝparis tutan vesperon ludante manian, unupersonan videludon de pafisto, kurante tra subteraj haloj, inunditaj koridoroj, noktomezaj turniĝantaj tuneloj, kaj malplenaj placoj sub fremda suno, pafante miajn armilojn al aroj de eksterteranoj, kiuj estis senĉese persekutante min. Mi enlitiĝis, facile endormiĝante, sed mi kelkajn horojn poste subite vekigis. Abstraktaj scioj fariĝis sentataj realaĵoj — Mi mortus! Ne ĝuste tie kaj tiam sed eventuale.

Evoluo dotis nian specion per potencaj defendmekanismoj por trakti ĉi tiun antaŭscion — precipe per psikologia subpremado kaj religio. La unua malhelpas nin konscie agnoski aŭ loĝi sur tiaj malkomfortaj veroj, dum la dua trankviligas nin promesante senĉesan vivon en kristana ĉielo, eternan ciklon de budhanaj reenarniĝoj aŭ alŝuton de nia menso al la Nubo (angle “Cloud”), la ekvivalento de la 21-a jarcento de ravo por nerdoj.

Morto ne havas tian regadon super nehomaj

animaloj. Kvankam ili povas funebri pro mortintaj idoj kaj kunuloj, ne ekzistas kredindaj evidentaĵoj, ke simioj, hundoj, korvoj kaj abeloj havas menson sufiĉe memkonscian por ĝeniĝi de la komprenon, ke unu tagon ili ne plu ekzistos. Tiel ĉi tiuj defendaj mekanismoj devas estiĝi dum lastatempa homa evoluo, de malpli ol 10 milionoj da jaroj.

Instruoj de religiaj kaj filozofiaj tradicioj jam delonge emfazis la malon: rigardu klare en la kavajn okulojn de la morto por forigi ĝian pikilon. Ĉiutaga meditado pri neekzisto malpliigas ĝian teruron. Kiel scienculo kun intimaĵoj pri mia propra morteco, miaj pripensoj turnas sin al kompreniĝo de kio estas morto.

Ĉiu, kiu entreprenos ĉi tiun serĉon, baldaŭ rimarkos, ke morto, ĉi tiu formala ĉeesto ĝuste super la horizonto, estas sufiĉe malsane difinita el ambaŭ scienca kaj medicina vidpunktoj.

DE LA BRUSTO AL LA KAPO

Laŭlonge de la historio, ĉiuj sciis, kio estis morto. Kiam iu ĉesis spiri kaj lia koro ĉesis bati dum pli ol kelkaj minutoj, la homo estis tutsimple morta. Morto estis bone distingita momento en tempo. Ĉio ĉi ŝanĝiĝis kun la apero de mekanikaj ventoliloj kaj koraj paŝigiloj meze de la 20-a jarcento. Moderna altteknika intensa prizorgado apartigis la koron kaj la pulmojn de la cerbo, kiu respondecas pri menso, penso kaj agado.

Responde al ĉi tiuj teknologiaj evoluoj, en 1968 la fama Raporto de la Komitato de la Medicina Lernejo de Harvard sur tiu kampo enkondukis la koncepton de morto kiel nereversebla komo — tio estas, perdo de cerba funkciado. Ĉi tiu ĝustigo ricevis la forton de leĝo per la Unuforma Determinado de Morto-Leĝo en 1981. Ĉi tiu dokumento difinas morton kiel, aŭ la nereversebla halto de cirkuladaj kaj spiradaj funkcioj de la korpo, aŭ la nereversebla halto de la cerba funkciado. Tutsimple, kiam via cerbo mortas, tiam vi estas morta.

Ĉi tiu difino grandparte uziĝas en la plej granda parto de la progresinta mondo. La loko de morto moviĝis de la brusto al la cerbo (kaj de publika vido al la privata sfero de la hospitalĉambro), kun la preciza tempo de efektiva cerba morto estante necerta. Ĉi tiu rapida kaj ĝeneraligita akcepto de cerba morto, konfirmita de prezidenta komisiono en 2008, estas rimarkinda, kiam oni komparas ĝin kun la daŭra polemiko pri aborto kaj komenco de la vivo. Eble ĝi



estas reflektata pri alia sed malmulte rimarkinda malsimetrio - homoj agonias pli pri tio, kio okazos poste, sed malpli pri tie, kie ili estis antaŭ ilia naskiĝo!

La granda parto de mortoj ankoraŭ okazas post koro-pulmona halto, kiu, tiam ankaŭ haltigas la funkciadon de la cerbo. Neŭrologia morto — specifita per nereversebla komo, foresto de respondoj, refleksoj de cerbaj tigoj aŭ spirado — estas malofta preter la intensiva prizorgunuoj, kie pacientoj kun vundoj aŭ senoksigenaj cerbaj vundoj aŭ toksometabolaj komoj (ekzemple, post superdozo de iu narkotaĵo) estas kutime akceptataj.

Cerba morto eble estas la difina faktoro, sed tio ne simpligas la klinikan diagnozon - biologiaj procezoj povas persisti post kiam la cerbo malŝaltas sin. Efektive, cerbo-morta korpo povas esti tenata "vivanta" aŭ sur "vivhelpo" dum horoj, tagoj aŭ eĉ pli. Por la malĝojaj parencoj kaj geamikoj, estas malfacile kompreni tion, kio okazas. Vizitante la intensivan prizorgunuon, ili vidas la bruston de la paciento moviĝantan en kaj eksteren, ili sentas pulson, la haŭta koloro aspektas normala, kaj la korpo estas varma. Aspektante pli sana ol kelkaj de la aliaj pacientoj, ilia amato nun laŭleĝe estas kadavro, kadavro kun batanta koro. La korpo estas ventolita kaj tenita en ĉi tiu kvazaŭ vivanta stato, ĉar ĝi nun estas ebla organdonacanto. Se oni akiras permeson, la organoj povas esti rikoltotaj el la kadavro por helpi la vivantojn, kiuj bezonas koron, renon, hepaton aŭ pulmon, organoj, kiuj ĉiam mankas.

Cerbe mortaj korpoj povas daŭre kreskigi ungojn, menstruiĝi, havi almenaŭ iom da funkciantan imuna funkcio, kiu permesas al ili kontraŭbatali infektojn. Estas pli ol 30 konataj kazoj de gravedaj cerbe-mortintaj patrinoj, kiuj estis metitaj sur ventolilon por subteni la kreskadon de la pluvivantaj fetoj, kiuj naskiĝis semajnojn aŭ monatojn (en unu okazo post 107 tagojn) post kiam iliaj patrinoj fariĝis cerbo-mortaj. En vaste diskutita rakonto de la jaro 2018 en Novjorko, juna virino, Jahi McMath, estis konservita pere de ventolilo hejme en Nov-Jerzejo, fare de ŝia familio, post ŝia cerba morto en malsanulejo en Kalifornio. Laŭ la leĝo kaj la establita medicina konsento, ŝi estis morta. Al ŝia amanta familio, ŝi estis vivanta dum preskaŭ kvin jaroj ĝis ŝi mortis pro sangado ligita kun hepata malsukceso.

Malgraŭ teknologiaj progresoj, biologio kaj medicino ankoraŭ malhavas koheran kaj principan komprenon pri tio, kio ĝuste difinas naskiĝon kaj morton - la du ekstretoj, kiuj limigas vivon. Aristotelo skribis en "De anima" antaŭ pli ol du jarmiloj, ke ĉiu vivanta korpo estas pli ol la sumo de siaj partoj. Li instruis, ke la vegeta (disvastigo atingita per neseksa

rimedo, disvastigo de plantoj) animo de iu ajn organismo, ĉu planto, besto aŭ persono, estas la formo aŭ la esenco de ĉi tiu vivaĵo.

La esenco de vegeta animo ampleksas siajn potencojn de nutrado, kresko kaj reprodukto, kiuj dependas de la korpo. Kiam tiuj esencaj kapabloj malaperas, la organismo ĉesas esti animema (termino kies radikoj iras reen al "anima", la latina por "animo"). La sentema animo intervenas en la kapablojn de ambaŭ bestoj kaj homoj por ke ili sentu la mondon kaj iliajn korpojn. Ĝi estas koncepto plej proksima al tio, kion ni modernuloj nomas "konscia sperto." Fine la racia animo estas la sola parto de homoj, kiu intervenas en racio, lingvo kaj parolado. Kompreneble, ĉi tio nun pli kaj pli estas imitita de artefaritaj inteligentecaj algoritmoj.

La moderna emfazo sur maŝinlernado, genomiko (angle genomics), proteomiko (angle proteomics) kaj granda datumo donas la iluzion kompreni, kio estas la vegeta animo. Tamen ĝi obskuras la profundon de nia nescio pri tio, kio klarigas la rompiĝon de la vegeta animo. Restas koncepta defio por difini tion, kio konsistigas la vivantan korpon de iu ajn — kio estas pli ol la sumo de ĝiaj individuaj organoj. Kiel oni povas precize limigi ĉi tiun korpon en spaco (ĉu vestaĵoj, dentaj enplantaĵoj kaj kontaktaj lensoj estas partoj de la korpo?) kaj en tempo (ĝian komencon kaj ĝian finon)?

Rimarku la vorton "nereversebla" en la nuntempa difino de neŭrologia morto. En la manko de preciza koncepta formulado pri kiam iu ajn organismo estas vivanta aŭ morta, la koncepto de nereversebleco dependas de la teknologio de la tago (france "du jour"), kiu konstante evoluas. Tio, kio komence de la 20-a jarcento estis nereversebla — halto de spirado — iĝis reversebla fine de la jarcento. Ĉu estas tro malfacile medite konsideri, ke tio estas la sama por cerba morto? Lastatempa eksperimento sugestas, ke ĉi tiu ideo ne estas senbrida pensado.

PARTA REVIVIĜO DE MORTINTAJ CERBOJ

Ĉijare granda teamo de kuracistoj kaj sciencistoj de la Yale Skolo de Medicino (Yale school of Medicine) sub la gvido de Nenad Sestan utiligis centojn da porkoj mortigitaj en Departemento de Agrikulturo – aprobita buĉejo por rimarkinda eksperimento, kiu publikiĝis en revuo "Nature". La esploristoj forprenis la cerbojn el la kranioj kaj konektis la karotidajn arteriojn kaj vejnojn al perfuza aparato, kiu imitas batadan koron. La aparato cirkuligas specon de artefarita sango, sinteza miksaĵo el komponaĵoj, kiuj portas oksigenon kaj drogojn al la cerbo, kiuj protektas ĉelojn

kontraŭ damaĝo. La magio troviĝas en la ĝusta molekula komponaĵo de la cirkulanta solvaĵo. Pensu pri dializ-maŝinoj, kiujn miloj da pacientoj ĉiutage uzas por forigi toksinojn el siaj korpoj ĉar iliaj renoj ĉesigis sian funkciadon.

Ĉi tiuj maŝinoj estas bezonataj ĉar kiam sango ĉesas flui tra la granda, energio-postulanta cerbo, stoko de oksigeno malpleniĝas en sekundoj, kaj la konscio perdiĝas. Senigi cerbon de oksigeno kaj sango-fluo dum pli ol kelkaj minutoj komencas deĉeniĝon de nereversebla damaĝo. Ĉeloj komenciĝas degeneri laŭ ĉiaspecaj manieroj (histo-damaĝo kaj malkomponaĵo, edemo, ktp), kiuj estas videblaj pere de mikroskopo.

La teamo de Sestan studis la realigeblon de la cerbo kvar horojn post kiam la porkoj estis elektrigitaj, sangelverŝigitaj kaj senkapigitaj. (Se ĉi tio al vi ŝajnas terura, tio estas kio ekzakte okazas al brutaro en buĉejo, tial mi estas vegetarano). La esploristoj komparis diversajn biologiajn indikojn kun tiuj de postmorte kontrolitaj cerboj de porkoj, kiuj ne trairis tra la procedo de la perfuza aparato kvar horojn post la morto, eterneco por la sentema nerva sistemo.

En unua vido, la restarigitaj cerboj kun la cirkulanta solvaĵo aperis relative normalaj. Dum la solvaĵo cirkulis, la fajna reto de arterioj, kapilaroj kaj vejnoj, kiuj trairas la cerban histon, respondis adekvate; la integreco de la histo estis konservita pere de malpliigo de ŝvelado, kiu alkondukas al ĉela morto; sinapsoj, neŭronoj kaj iliaj eligaj dratoj (axonoj) aspektis normalaj. Glial ĉeloj, la malestimindaj entoj, kiuj subtenas taŭge la neŭronojn, montris iom da funkciadon, kaj la cerbo konsumis oksigenon kaj glukozon, kiu estas la universala energia monero de la korpo, indiko de ia metabola funkciado. La titolo de la dokumento pere de kiu estis anoncita la esploro estis aŭdaca: "Restarigo de Cerba Cirkulado kaj Ĉelaj Funkcioj Horojn Post la Morto".

Kio mankis en ĉi tiuj rezultoj estis la cerbaj ondoj, kiuj estas familiaraj de elektroencefalografiaj (EEG) registraĵoj. Elektrodoj metitaj sur la surfacon de la porkaj cerboj mezuris neniun spontanegan totalan elektran agadon: neniun el la profunde malrapidaj ondoj, kiuj kunmarŝas tra la cerba kortekso dum profunda dormo, neniun abrupta paroksismo de elektra aktivado sekvis la silenton – kio estas konata kiel krevo aŭ eksplodo-subpremado. Nur plata linio vidiĝis ĉie – totale izoelektra linio – montranta kompletan foreston de ia ajn konscio. Silenta cerbo, elektre parolante, ne montras spertantan menson. Sed tio ne estis surprizo. Ĉi tiu stato estis ĝuste tio, kion celis Sestan kaj liaj kunlaborantoj, stato kial la cirkulanta solvaĵo enhavis koktelon de drogoj, kiuj subpremas

neŭronan funkciadon kaj korespondan sinapsan komunikadon inter la ĉeloj.

Eĉ kun la foresto de cerbaj ondoj, ĝi surprizis min, min laborantan neŭroscienciston, ke individuaj porkaj kortikaj neŭronoj ankoraŭ konservis sian kapablon generi elektran kaj sinapsan agadon. La teamo de Yale pruvis tion elprenante malgrandan splinteton de neŭra histo el tiuj cerboj, forlavante la perfuzan solvaĵon kaj poste ekscitante la individuajn neŭronojn per elektra kurento liverita de eta elektrodo. Kelkaj el ĉi tiuj ĉeloj respondis taŭge generante unu aŭ serion de la stereotipaj elektraj pulsoj, la tiel nomataj ago-potencialantoj aŭ akraj-punktoj, kiuj estas la universa idioma de rapida komunikado en iu ajn progresinta nerva sistemo.

Ĉi tiu eltrovo levas profundan demandon: Kio okazus se la teamo forigus la blokantaĵojn de neŭra aktivado el la solvaĵo kiu sternis la cerbon? Plej verŝajne nenio. Nur ĉar kelkaj individuaj neŭronoj konservis iom da potencon de ekscitebleco ne signifas, ke milionoj kaj milionoj da neŭronoj povas spontane sin organizi kaj eksplodigi elektran koruson. Kaj tamen! Oni ne povas forĵeti la ideon, ke kun ia ekstera helpo, ekzemple pere de ia speco de kortika defibrililo, tiuj "mortaj" cerboj povus esti funkciigitaj, revivigante la cerbajn ritmojn, afero kiu karakterizas vivantan cerbon.

Por deklari la evidentan, senkapigi iun ajn senteman estaĵon kaj lasi ĝian cerbon elverŝi sian sangon ne estas afero, kiu kondukas al sia bonstato. Reanimi ĝin post tia grava traŭmato povus konduki al profunda patologio, kiel amasaj epileptaj krizoj, deliro, profunda doloro, aflikto, psikoza, ktp. Neniu estaĵo devas suferi tiel. Ĝuste por eviti ĉi tiun situacion, la Yale-teamo malhelpis la neuronan funkciadon.

Ĉi tio enkondukas al la granda demando. Ĉu ĉi tiu procedo povas esti aplikita al la homa cerbo? Antaŭ ol vi renkonsciigos pensu pri la jeno. Kion vi dezirus fari, se via infano aŭ partnero estus trovita sufokite aŭ superdozite, sen pulso aŭ spiro dum horoj? Hodiaŭ verŝajne tiu estus deklarita morta. Ĉu tio povus ŝanĝiĝi morgaŭ per ia speco de teknologio eltrovota de la grupo Yale? Ĉu tio ne estus inda afero por postsekvi?

Porka cerbo estas relative granda cerbo, male al tiu de la multe pli malgranda muso, la plej populara laboratoria besto. Porka kortekso estas tre faldita, same al la homa kortekso. Neŭrokirurgiaj procedoj estas rutine testataj sur porkoj antaŭ ol provi ilin sur homoj. Do, la teknika respondo estas "jes"; principe tio povas esti farota.

Sed ĉu ĝi devas esti farota?

Certe ne ĝis ni komprenos multe pli bone, ĉu la

rekonstruita besta cerbo montras totalan elektran agadon tipan de sana cerbo, sen streĉaj respondoj, kiuj montras doloron, mizeron aŭ agonion. La fako entute devas paŭzi kaj pridiskuti la kuracajn, sciencajn, leĝajn, etikajn, filozofiajn kaj politikajn demandojn pri tia esplorado kun ĉiuj concernatoj.

Tamen la timo pri la anĝelo de morto ne estos forpuŝita. Pli frue aŭ pli malfrue, ie sur la planedo, iu provos provizore trompi morton.

tradukis **Vasil Kadifeli** el Turkujo

Fonto: <https://www.scientificamerican.com/article/is-death-reversible/>

Ĉi tiu artikolo estis unue eldonita kun la titolo "Ĉu Morto estas Reversebla?" en *Scientific American* revuo 321, 4, 34-37 (oktobro 2019)

Ĉu vere ?!

-- amuze rakontas Maurizio Brucco el Hispanio

Hieraŭ, en la preĝejo, mi renkontis la superviron.

- "Saluton sinjoro Klarko

Kento, kiel vi fartas?" mi diris al li.


- "Ne kriu, stultulo ! Mi deziras resti inkognite !" li respondis. Kaj poste li ekparolis:

- "Mia vera nomo ne estas Klarko Kento. Mi nomiĝas Klarko Zamenhof. La rakonto, kiun vi konas, estas malvera. Mi naskiĝis en la planedo Kriptono, kaj kiam la raketo, kiun mia patro konstruis, surteriĝis en Pollandon en la 19-a jarcento, mi estis adoptita de la familio Zamenhof. Tie mi kreskis kune kun Ludoviko. Li estis inteligenta knabo, kaj tre scivolema. Li ĉiam demandis pri la lingvo de mia planedo. Ni kriptonanoj havas senesceptan lingvon, unu fonemo por unu litero, verboj estas regulaj, ktp. Li ĉiutage, dum jaroj, demandis kaj obsede demandadis pri la gramatiko de mia idiomo, kaj prenis notojn.."

Vi povas imagi mian surprizitan vizaĝon aŭskultante tion:

- "Ĉu vere, Esperanto devenas el Kriptono? Ĉu vere ĝi estas eksterterana lingvo?"

- "Certe, mia kara, kompreneble" li kapjesis...



26>> *Fumo el la bruligataj kadavroj leviĝis,
sango el senkulpaj homoj
tinkturis ruĝe la riveron Urakami.
La urbo fariĝis ebena,
plena de krakantaj tegiloj kaj nigraj kadavroj.
Finfine la milito finiĝis.
Finfine la milito finiĝis, postlasinte keloidojn.*

*Sed mi ne plu havas gepatrojn, nek gefratojn.
Homoj estas forgesemaj,
do ili ripetas erarojn,
sed ili ne forgesu tiun tragedion,
ili ne ripetu tian tragedion,
neniam kaj neniam....*




Preĝejo Urakami post la atombombado

Stellan Engholm

– sveda realisto en esperanta vesto

Oriĝinalaj romanoj en Esperanto ne svarmas, des malpli premiitaj. Eble mi malpravas, sed laŭ mia scio la sola ekzemplo estas romano de la verkisto, kiun mi prezentas al vi nun: Stellan Engholm. Tiu romano, *Homoj sur la tero*, estis premiita en romano-konkurso de la grava literatura revuo



Literatura Mondo en 1931. Ĝis tiu tempo nur kvar jaroj pasis ekde la esperantistiĝo de la verkisto, de kiu antaŭe aperis du libroformaj verkoj; traduko kaj alia romano. Oni povas nur admiri tian energion, tian verkistan vervon, jam en la komenca fazo de lia esperantisteco.

Stellan Engholm estis svedo, naskita en Stokholmo en 1899. Profesie li estis popol-lerneja instruisto. Li aktive esperantistiĝis en 1927, ekkoninte la lingvon tamen pli frue, kiel junulo. Lia esperantista aktivado daŭris seninterrompe sur la kampoj de literaturo kaj redaktado dum pli ol tridek jaroj, ĝis lia morto en 1960.

En originalaj verkoj de Engholm manifestiĝas feliĉa kombino de realismo kaj idealismo. Ideologiaj meditoj tamen iom tro altrudas sin en lia unua romano *Al Torento* (1930), sed en la premiita *Homoj sur la tero* la verkisto jam firme tenas sin ĉe tiu konkreta realismo, kiu ĉiam poste karakterizas liajn verkojn. Liaj romanoj ne celas eksciti la emociojn, sed serĉi kaj raporti la veron kun senpasia humanismo. Engholm estas tre preciza observanto de la realaĵoj de la vivo kaj ne emas doni lokon por la fantazio en siaj romanoj. Luj opinias, ke tio faras liajn personojn iom monotonaj kaj bremsas la evoluigon de eventoj. Sed tion la verkisto kompensas per lerta uzado de delikata psikologio. La stilo kongruas kun la sobra pritrakto de la temoj. La stilo estas samtempe flua kaj klara, la frazstrukturo rekta kaj senkomplika. El lingva vidpunkto la romanoj de Engholm estas aparte taŭga legaĵo por novaj esperantistoj.

Homoj sur la tero rakontas la historion de kamparana familio tra tri generacioj. En la centro staras la bieno, la tero mem, kiel pulse vivanta

ĉefpersono, kiu indiferece observas la homojn, iliajn penadojn, perdojn kaj gajnojn, – tiu tero, kiu donacas celojn kaj sencon al iliaj vivoj. La temo estas grava kaj serioza.

La demandon pri la taskoj de originala Esperanto-verkisto Engholm respondis jene (en *Literatura Mondo*, 1932): “Antaŭ ĉio ili verku serioze!” Kaj tiun seriozecon Engholm trovis en la ordinara vivo de ordinaraj homoj sur la vivodona tero kaj ĝin transportis fidele en sian arton, sen ornamoj, sen fantaziaĵoj.

La tiel nomataj Torento-libroj de Engholm: *Infanoj en Torento I* (1934), *Infanoj en Torento II* (1939) kaj *Vivo vokas* (1946) rakontas la vivhistorion de kelkaj laboristaj infanoj ekde infanaĝo ĝis plenkreskiĝo. Torento estas fer-industria vilaĝo en la meza parto de Svedujo. La unua volumo pritraktas la malfacilan situacion en la vilaĝo pro granda senlaboreco. Tio kreas problemojn en la vivado kaj pensado de la infanoj. Ili finas lernejon kaj transiras al sia gejunula aĝo. En tiu tempo ili fariĝas esperantistoj, kio kunligas ilin kun pli vasta medio. En la dua volumo la gejunuloj komencas labori kaj partoprenas la ordinaran vivon de la vilaĝo. En *Vivo vokas* iliaj vivhistorioj pluiras kaj evoluas, ĉiam same realisme. Entute la Torento-libroj formas kontinuan unuecon, ĝue legeblan, malgraŭ manko de ekscita okazaro.

Stellan Engholm estis elstara tradukisto el la sveda literaturo. Inter liaj tradukoj troviĝas tri romanoj de Selma Lagerlöf (Nobel-premiito 1909): *La mono de sinjoro Arne* (1933), *Gösta Berling* (1934) kaj *La ringo de la generalo* (1938); *Pasko*, dramo de August Strindberg (1935) kaj *La fino de Folke Bernadotte* (1946). Stellan Engholm estis unuavice tradukanto de prozo, sed li okupis sin ankaŭ iom pri tradukado de poezio, precipe por *Sveda Antologio* (1934).

Stellan Engholm estis ankaŭ kapabla redaktoro. Dum kelkaj jaroj li eldonis revuon moder-aspektan, sed enhavoriĉan, nomitan *Malgranda revuo* (1943-1952). Li multe kontribuis ankaŭ al aliaj Esperanto-revuoj.

Stellan Engholm grave kontribuis al la Esperanta literaturo per siaj tradukoj kaj originalaj verkoj. Lia verkaro daŭre restas alte taksata kiel modelo de pura kaj klara stilo, enhance substancia kaj riĉodona.

de **Baldur Ragnarsson**

(Juna amiko, n-ro 106, 2003)

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/engholm.html>

Franco KAFKO (Franz Kafka) * Rakontoj



Pensigo por rajdistoj

Nenio, se oni pripensas, povas delogi al esti la unua en vetkuro.

La gloro esti agnoskata la plej bona rajdisto de la lando, ĝojigas ĉe l'eko de l'orkestro tro forte ol ke sekvamaten eviteblus la pento.

La envio de la kontraŭuloj, de ruzuloj sufiĉe influhavaj, ne povas alie ol nin dolori en la mallarĝa spaliro, kiun ni nun trarajdas post tiu ebenaĵo, kiu estis antaŭ ni baldaŭ malplena escepte de kelkaj superronditaj rajdistoj ete alrajdantaj kontraŭ la randon de la horizonto.

Multaj el niaj amikoj rapidas enspezi la gajnon kaj nur super la ŝultroj ili krias de la foraj giĉetoj al ni sian huraon; sed la plej bonaj amikoj tute ne vetis nian ĉevalon, ĉar ili timis, ke se venus la perdo, ili devus pri ni koleri, sed nun, ĉar nia ĉevalo estis la unua kaj ili nenion gajnis, ili returnas sin, kiam ni preterpasas, kaj preferas rigardi laŭlonge de la benkaroj.

La konkurantoj malantaŭe, firme en la selo, provas superrigardi la malfeliĉon ilin trafinta kaj la maljustecon iel al ili kaŭzita; ili alprenas freŝan aspekton, kvazaŭ devus komenci nova konkurso kaj serioza post tiu infanludo.

Al multaj sinjorinoj la venkinto ŝajnas ridinda, ĉar li pufiĝas kaj tamen ne scias kion fari kun la eterna manskuado, salutgestado, subenkliniĝo kaj salutadon-en-la foron, dum la venkitoj estas fermintaj la buŝon kaj al siaj plejparte henantaj ĉevaloj leere frapetas la kolon.

Fine el la griziĝinta ĉielo komencas eĉ pluvi.

La straffenestro



Kiu vivas solece kaj tamen ŝatus ie aŭ tie aliĝi, kiu kun konsidero al la ŝanĝiĝoj de la tagparto, de la profesiaj kondiĉoj kaj similaj volas sen pluaĵoj tuj vidi ian brakon, ĉe kiu li povus sin teni, - tiu ne longe vivas tiel sen straffenestro. Kaj se li statas tiel, ke li serĉas nenion kaj kiel laculo alpaŝas la fenestron, la okulojn alterne inter publiko kaj ĉielo, kaj li ne volas kaj tenas la kapon iomete retroklinita, tamen malsupre la ĉevaloj lin kunŝiras en sian sekvantaron de ĉaroj kaj bruo kaj per tio fine al la homa konkordo.

Deziro fariĝi indiano

Ke oni estu do indiano, tuj preta, kaj sur la kuranta ĉevalo, oblikve en la aero, ĉiam ree mallonge ektronus super la tremanta grundo, ĝis oni lasis la spronojn, ĉar spronoj ne ekzistis, ĝis oni forĵetis la bridojn, ĉar bridoj ne ekzistis, kaj apenaŭ vidis antaŭ si la landon kiel glattonditan erikejon, jam sen ĉevalkolo kaj ĉevalkapo.

La arboj

Ĉar ni estas kiel arbotrunkoj en la neĝo. Ŝajne ili surkuŝas glate, kaj per puŝeto oni devus esti kapabla forŝovi ilin. Ne, tion oni ne povas, ĉar ili estas firme ligitaj kun la grundo. Sed vidu, eĉ tio estas nur ŝajna.

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/kafka.html>

* *Franz KAFKA naskiĝis la 3-an de julio 1883 en Prago, mortis la 3-an de junio 1924 en Kierling [Kirling] (Aŭstrio) estis aŭstra germanlingva verkisto de noveloj kaj mallongaj rakontoj.*

Ŝercoj



Du amikoj, judo kaj ruso
babilas. Judo:
- Judoj renkontas sabaton
kun vino kaj poste nenion

faras.

Ruso:

- Nu, tiam mi estas pli juda ol vi ĉar por
mi ĉiutage estas sabato!

- Karulo, mi ne telefonus al vi, sed se
via edzino trovus mian kalsoneton en
via aŭtomobilo, tio estus malbone... Ĉu
vi trovis ĝin?

- Jes... Ne zorgu, mi trovis ĝin hieraŭ...


- Kial vi ne tuj diris tion al mi?

- Ĉar mi ne estis certa, ĉu ĝi estis la via!

Du amikoj.

- Kiel vi rilas al via edzino?

- Ĝuste tiel, kiel mi rilatas al nia registaro. Mi iomete
timas, iomete amas, iomete volas alian...



- Do vi asertas, ke via bopatrino malaperis. Ĉu ne?

- Jes.

- Kiam?

- Antaŭ du jaroj.

- Homo! Kial vi nur nun anoncas ŝian malaperon?

- Ĉar mi ne kuraĝis kredi je tio.

Krucvortenigmo

-- el Semajno de Enigmoj

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Kemia elemento kun la simbolo Ar; 6. Prezantanta ŝanĝojn; 11. Akiradi sciojn pri scienco, arto, metio; 12. Kemia elemento kun la simbolo Ba (akuzativo); 13. La Eŭropa ___ (EU); 14. ___ gimnastiko estas olimpika disciplino; 15. Muskolo (en kunmetaĵoj); 16. Kemia elemento kun la simbolo Th; 17. Jodido de kalio je kemio.; 18. Nedifina pronomo; 19. Akvotrais; 20. Ĉefmemoro, parto de memorsistemo; 21. Mordis; 22. Al la ___ ne instruu naĝarton (Zamenhof); 23. Kemia elemento kun la simbolo Ir; 25. Parolan, buŝan; 26. Kontraŭo de komandis; 27. Parto de preĝejo destinita por koruso.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Kemia elemento kun la simbolo Al; 2. Kemia elemento kun la simbolo Re; 3. Greno senigita preskaŭ komplete de ŝelo; 4. Frakcio kun numeratoro egala al unu; 5. ___, vi, ili; 6. Apresis, amis; 7. Ne servas larmo kontraŭ ___ (Zamenhof); 8. ___, via, lia; 9. Litero Ĝ; 10. Kemia elemento kun la simbolo Sb; 12. Precizigis la pozicion de punkto en la spaco per

1	2	3	4	5		6	7	8	9	10
11						12				
13					14					
15				16					17	
18			19					20		
		21					22			
23	24					25				
26						27				

trigonometriaj metodoj; 14. Kemia elemento kun la simbolo Rh; 16. Boardis; 17. Sekretaj; 19. Percepti per la okuloj; 20. En abunda maniero; 21. En religia maniero; 22. Pasinta doloro ___ el memoro (Zamenhof); 24. Kemia simbolo por rubido; 25. Litero V.

Fonto: Semajno de Enigmoj #4

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo de la krucvortenigmo troviĝas en la lasta paĝo)

DUA PARTO - LA VIVO

64



**Kio ankoraŭ estas trankvila, tio facile kapteblas.
 Kio ankoraŭ ne aperis, facile pripenseblas.
 Kio ankoraŭ estas delikata, facile rompeblas.
 Kio ankoraŭ estas malgranda, facile disŝuteblas.
 Oni devas efiki tion, kio ankoraŭ ne ekzistas.
 Oni devas ordigi tion, kio ankoraŭ ne estas konfuza.
 Arbo kun amplekso de du metroj ekestas el hararsimila tigo.
 Naŭ etaĝojn alta turo ekestas el monteto da tero.
 Mil mejlojn longa vojaĝo komenciĝas antaŭ viaj piedoj.
 Kiu agas, fuŝas ion.
 Kiu firmtenas ion, perdas tion.**

**Tial tiel estas ankaŭ pri la saĝulo.
 Li ne agas, tial li ne fuŝas ion.
 Li firmtenas nenion, tial li ne perdas ion.
 La homoj okupas sin pri siaj aferoj, kaj ĉiam, kiam ili preskaŭ pretas, ili fuŝas la aferon.
 Oni atentu pri la fino same tiel, kiel pri la komenco,
 tiukaze ne ekestas fuŝoj.**

**Tial tiel estas ankaŭ pri la saĝulo:
 Li deziras sendezirecon.
 Li ne ŝatas malfacile akireblajn posedojn.
 Li lernas la nelernadon.
 Li returnas sin al tio, kion preteriras la amaso.
 Tial li kreskigas la naturan kuradon de la aĝoj kaj ne arogas al si agi.**

Rimarkoj de Anniespera:

Pri „malgranda“: En la originala teksto, la vorto „wei“ (fonetike) ĉi tie signifas ne nur „malgranda“, sed „tre tre malgranda.“

Pri „disŝuteblas“: En la originala teksto la vorto „san“ (fonetike) signifas „esti dispecetigita“. Vd. la tradukon de ĉi tiu frazo de Wang Chongfang:

„Tio, kio estas tre malgranda, estas facile dispecetigebla.“

Pri „amplekso de du metroj“: en la originalo ne ekzistas la preciza mezuro, nur esprimo per la komparo „he bao“ (fonetike), kiu laŭvorte signifas „ĉirkaŭi per la du brakoj“.

Pri „mejlajn“: En Ĉinio la nacia mezurunuo pri distanco estas „li“ (fonetike).

Pri „antaŭ viaj piedoj“: En la originala teksto, la vorto „zu xia“ (fonetike) laŭvorte ja signifas „viaj piedoj“, sed ĉi tie ĝi signifas „la unua paŝo“. Vd. de Wang Chongfang:

„Vojaĝo de mil li-oj komenciĝas per la unua paŝo.“

Rimarkoj de Cezar

„Mil mejlojn“ (laŭ Anniespera: li-ojn) „Longa vojaĝo komenciĝas antaŭ viaj piedoj.“ Frazo, kiu akompanas min jam dum multaj jaroj. Tial mi havas neniam problemojn ekagi. Sed mi devas ankoraŭ pli atenti pri tio, ke „oni atentu pri la fino same tiel, kiel pri la komenco“, ĉar tial ne ekestos fuŝago.

Interesa afero eble estas ankaŭ, ke germanoj en la ĉiutaga vivo uzas la frazon: „Kiu ne faras ion, tiu ne povas fuŝi ion“, preskaŭ nur moke, nur negative, por motivigi pigrumadon ks. La pozitivan enhavon oni ĉe tio apenaŭ pripensas.

Simile estas pri la tri famaj simioj el Japanio, kiuj intence ne aŭdas ion kaj ne vidas danĝeran aŭ malutilan kaj ne parolas pri tio, kio povus esti damaĝa al ili. Tion germanoj kutime miskomprenas kiel nuran malkuraĝan neagadon. Sed ankaŭ tiu – ofte necesa – neagado pozitive interpreteblas kaj do havas pozitivan flankon.

Tiel ankaŭ la neagado de Laocio facile misinterpreteblas, se oni tro rigore rigardas lian devizon de l' neagado. Ĉar ankaŭ trinkado kaj manĝado estas agoj; tiu, kiu tute ne plu agus, mortus post kelkaj tagoj. Sed tion Laocio kompreneble ne celis.

(daŭrigota)

8>> pri mi, pri ni... , el tiuj promenadoj forpasemaj, kaj deĉiam mortkondamnitaj, kiel ĉio, kiuj estis hejme kaj, « ĉiutagaĵaj », kaj nunantaj. Mi repensas pri ĉio tio legante, ke la srilankdevena sciencisto Chandra Wikramasinghe, kunlaborinto de Fred Hoyle, verkis anglajn haikuojn kiam adolesko sub la ĉielo de sia insulo. mi esperantigis ĝin :

*Sub svarmo da steloj staras mi plaĝe.
 Kaj min mi demandas sola,
 kiom da viv' kaj am' estas ĉinokte ?*

verkis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

Kolĉiko – Heroldo de la vinthro

Se la norda vento blovas kaj serĉas kie sin enŝovi, vi prientenu al ĝia voĉo – ĝi portas informon. Vi preparu por vi varman ĉapelon, ŝalon, eĉ pelton.

“Venas la vinthro”, tion al vi diras la sama kolĉiko. Per sia lila rigardo, ĝi okulfiksas la grizan ĉielon kun espero pri ankoraŭ iu varma tago. Sed ĝi klinos la kapon antaŭ la ŝanĝo.

Baldaŭ la norda vento kun sia blovorkestro venigos la vintron solene. La juna vinthro ŝatas blankecon. Ĝi ĝoje ornamos per blankaj steletoj ĉion, kion ĝi renkontos. Ĝi kovros sternaĵojn el neĝo, por ke estu mola la vojo sub ĝiaj piedoj. Poste kune kun la orkestro de la vento ĝi kantos feliĉa.

Novjara festo en la arbaro

La neĝe kovrita arbaro blankas kiel novedzino antaŭ la altaro. Kiu frue leviĝas, tiu faras vojon. Alia cerbumas, lulas milde siajn branĉetojn kaj surŝutas per steletoj la scivolemajn bekojn kaj nazetojn.

- En la arbaro estos io, venos io!... – ekflustris pasereto.

- Hej, etulo, vi ne miru, vi ekflugu! – kriis la korniko de iu branĉo seka. La tuta paseraro kvivitis kaj ekflugis, ĉiuj similaj unu la alian.

Flugas la plumohavaj kaj kantas: “Nia anaro pace sur siaj flugiloj portos la Novan jaron...”

Sur la neĝo leporoj – fratoj, kuzoj kaj najbaroj – marŝas. Post ili – la sciuretoj, la vulpetoj kaj la lupetoj .



Eĉ ursetoj ne dormas kaj viciĝas en la kolono. Ĉiuj ĉirkaŭrigardas sin – kion ili serĉas?

- Haltu ĉe mi! – mallaŭte diris abio. – Mi petas vin, ne haku min, nur min ornamu! Mi estas juna, lasu min viva renkonti kun vi la feston!

Ekkantis tiam la birdoj: - Pravaj estas la abio, pinoj kaj aliaj, ili volas vivi. Ni gardos kaj ornamos tiun abion...

Fine ili ekdancis kaj Ĵuris: “ Ni amikiĝu kaj interfratiĝu! “

Nerimarkeble venis la Bono en la animojn de la arbaraj loĝantoj: - Vivu pace sur la tero!...Feliĉan Novan Jaron!

verkis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgario

31>> Lasu ŝin aĉeti vestojn kaj ŝuojn laŭvole, ĉiam! Eĉ, helpu al ŝi en la aĉetado kaj selektado daŭranta plurajn horojn! (Kaj bonvolu rideti dume!)

Lasu ŝin telefoni dum horoj, kaj pagu ŝiajn fakturetojn!

Ne ronku!

Venu al vi en la kapon, ke vi ne malŝatas futbalmatĉojn kaj aŭtokonkurojn Formulo-1!

Razu vin ĉiutage por ne ĝeni ŝian haŭton!

Ne pensu nur pri la seksumado, sed ne troigu la malon, proponu ĝin al ŝi, eĉ se vi estas laca!

Obeu ŝin, se ŝin doloras la kapo, sed se ŝi petas ion de vi, tuj plenumu ŝian deziron! Ho! Kaj ne ekdormu tuj post la fino, rigardu al ŝiaj okuloj kaj karesu ŝin ĝis ŝi silente endormiĝos!

Diru al ŝi ĉiumomente, ke ŝi estas la plej bela virino, kiun vi iam ajn vidis...

La elĉerpita disĉiplo turnis sin por iri malsupren de sur la montosupro. La majstro postkriis lin:

-- Atendu filo, revenu!

Sed li respondis:

-- Nee, majstro... Sufiĉas!

afiŝis en facebook'o
Jevgenia Sorokina el Rusio

Braveco ne estas

Ne estas braveco militi por
forkapti tion kio ne vin apartenas,
Ne estas braveco, puni malfortunon,
por simple havigi bonojn al si mem.

Ne estas braveco la frenezeco,
kiu mortigan spiriton flambruligas,
braveco ja estas nur amo,
ankaŭ al iuajn seninterese.

Braveco ne estas devigi,
iun ekami vin pro bezono,
braveco estas resti en ties koroj,
eĉ se tion ili ne buŝesprimas.

Braveco estas ne lasi foriri,
tiun kiu amis vin tutkore,
ke pentu ne sentu timon,
pro tio perdita iutage.

Braveco estas ke vi ĝisfine,
ne forlasu bonajn amikojn,
eĉ kiam vi pensas ke nenie
troviĝas,
amikeco ne forviŝita de vivo.

Braveco estas malfortunon vi
defendu,
alie estus frenezeco, ne braveco,
ekde miloj da jaroj de monda
ekzisto,
vi erare komprenas sencon de
vorto.

Braveco ne estas fariĝi diktatoro,
kaj al popolo imponi vi sklavecon,
Braveco estas labori ĉiuhore,
por alporti al homoj feliĉecon.

Plaĝo, Durrës, 11-an e aŭgusto, ni havas ŝancon babili pri multo
2017 kion ni ne povis dividi
je socio de aliuloj.

Mi kaj soleco


Ofte mi sentiĝas pli socia
je ĉeesto de mia soleco

Kaj mi invitas min drinki
eĉ unu glason kune
tiel foriĝas maltrankviloj
pro soleco ĉe ceteraj homoj.

Nun ambaŭ ni ne plu solecas
neniu rompas nian socion.
kaj en ĉi tiu ripozmomenteto



Tirana, 3.10.2017

**Kial mi fariĝis esperantisto?**

Nun mi povus diri, ĉar ĝi estas rapide kaj facile
ellernebla. Fakte tio ĉi estas vera. Ĝi estis
alloga vidpunkto por mi. Mi sufiĉe malfacile
lernis fremdajn lingvojn en la lernejo. Ĉiam mi estis
inter la malbonaj lernantoj. Mia diligento, lerteco kaj
scio ne ĉarmis la lingvoinstruistojn, eĉ unufoje ŝi
manifestis: "mi manĝos mian ĉapelon, se vi ellernos
iun lingvon. Vi estas tute maltalenta."

Mi ne scias, ĉu ŝi manĝis sian ĉapelon, ĉar mi
ellernis Esperanton. Verdire laŭ multaj homoj ĝi ne
estas vera lingvo. Ĝi estas miksitita kun aliaj naciaj
lingvoj.

La Zamenhofa lingvo malfermis antaŭ mi multajn
pordojn, eĉ pordegojn kaj mi povis enpaŝi belegan
internacian mondon dume mi estis egalrajta kun
fremdaj homoj parolantaj diversajn lingvojn.

Mi neniam forgesos, kiam mi unufoje parolis
Esperanton dum la kongreso de TEJO en Sarajevo.

Mi jam multfoje kaj multloke skribis, parolis ĝis

verkis Apáti Kovács Béla el Hungario

tiam, ke tiu ĉi urbo signifis por mi la
komencon de la unua mondmilito. Sed post
la kongreso, kiam mi legis aŭ aŭdis la
nomon de tiu ĉi admirinda urbo, ĉiam mi
devis pensi pri paco.

Mi scias, poste en Bosnio okazis nova eble pli
terura milito, tamen tio ne povis malheligi la pacan
kunvivadon de diversnaciaj gejunuloj dum unu
semajno. Esperanto helpis, kaj montris al mi per unu
komuna, sendependa lingvo, ke la homaro povus vivi
fratece unu kun la alia konservante la nacian
egalecon. (Eble estas tiuj, kiuj malsamopiniis, sed
nun tio ĉi ne gravas).

Eble jam en mia vivo ne okazos, ke Esperanto
estos akceptita universale en ĉiuj landoj. Tamen mi
ege esperas, ke ĝi iam realiĝos, eble cent, du cent aŭ
kvin cent jarojn poste, sed ja alvenos la fina venko.



verkis **Apáti Kovács Béla** el Hungario

Skizeto pri Amikeco

Estis post la danco en Westminster, ke ni staris kune en la arkaĵo de la subfervoja stacio, sen parolo, sen deziro disiĝi. Dum iom da tempo ni staradis ankoraŭ, lasante nin trempiĝi en la milda nokta aero. Preterpasis nin homoj ĉiaj, geamantoj, malrapidante sencele tra la arkaĵo kaj reen, geedzoj malpli revemaj, tiom pli kontentaj, senhejmulo senvorte etendanta skatoleton da alumetoj, altkreska, fortika policano rigardanta lin minaceme, gazetvendisto esperanta vendi la lastajn ekzemplerojn de la vespera ĵurnalo, loĝantoj de la eksterurboj rapidantaj al la ĉefstacidomo por trafi la malfruajn vagonarojn, kiujn oni aranĝas speciale por la sabata vespero.

"Venu," mi diris al Joĉjo, tuŝante lian brakon, "ankoraŭ unufoje tra la stacidomo – morgaŭ estos dimanĉo, ĉu ne?"

"Kaj tamen mi volas frue leviĝi," li ridetis, tamen ekmoviĝante.

Estas io, pri la ĉirkaŭaĵo de la stacidomo Victoria, al mi escepte alloga. Ĉiam estis tiel, de kiam mi unue venis al Londono, ĉe la komenco de la mondmilito, kiam la butikoj estis etaj, malnovaj, kaj malpuraj. Nun, kiam oni vidas ĉie grandajn, novajn magazenojn, nokte brilantajn je lumreklamoj ĉiukoloraj, nun ankoraŭ la etoso estas al mi alloga, mistera, romantika, simpatia. Ĝenas nur la noveco de la bierejo "Windsor Castle", el tiaj lokoj mi preferas ĉiam la intimajn, malnovajn, same kiel oni amas pipon vere forĵetandan.

Estis jam post la dek-unua, do neeble eniri la tetrinkejon Lyon's, (tiun kiu estas rekte kontraŭ la subfervojo, ne tiu apud la muzikhalo; la unua estas multe pli interesa, tie per dupenca taso da teo [laŭ dimanĉa tarifo tripenca] oni povas sidadi kaj observi "la mondon kaj lian edzinon", laŭ nia frazo) krome mi sentis, ke Joĉjo, same kiel mi, estas en moviĝema humoro, kaj ni direktis niajn paŝojn tra la strato Wilton, preter la itala kafejo kie Joĉjo unufoje citis al mi el Hohlov: "Jen ĝi brilas, mia lumo..."

Estis en la vespero de tiu tago, ke mi kuniris kun li al lia loĝejo, kaj ke li pruntedonis al mi la volumeton, kaj en tiu vespero, ke li konigis al mi la poemon de Baghy. Kara Joĉjo, kiom mi ŝuldas al li! Li havas nur dudek-kvar jarojn, estas do malpli aĝa ol mi je tuta jaro, sed mi ĉiam lasis lin esti la gvidanto en la ĝardeno de la poezio, al mi li ĉiam konigis siajn eltrovaĵojn.

"Ĉu mi ne pravis?" li nun diris. Mi komprenis, ke

ankaŭ li memoras pri tiu babilado.

"Kiam vi avertis min, ne atendi trovi en la Esperanta poezio la amon, kia oni konceptas ĝin en la angla? Jes, kompreneble. En nia ĝisnuna poezio oni trovas ofte la vorton "amo" sed en efektivo nur la memoron pri ĝi aŭ la korpan pasion. Oni neniam trovas tiun ekstazon, kiun donas "Helen, thy beauty is to me..." el Poe, aŭ "My dear, your lips, adorable", el Rupert Brooke. Eble tiu nekorpora ekstazo estas propra al la angla literaturo?"

"Mi ne scias. Tamen, mi ne dubas, ke la angla prudemo, kiun ni tiom ofte malbenas, liveris al ni belajojn nekonatajn en landoj, kies ideologioj estas malsamaj. Ekzemple, vi memoras de Joseph Hergesheimer 'The Lay Anthony', li rave ridetis, "jes, kompreneble, nu, tuta ĝia beleco devenas el kaj dependas je la koncepto, ke Antonio bele agas, restante virga, pro la memoro de sia amatino."

"Jes, la idealigo de la ĉasteco pro estetika aŭ almenaŭ senreligia motivo, tio naskis multon belan en la angla literaturo, ekzemple de Meredith...", mi recitis verson el 'Modern Love', kiun li daŭrigis.

Subite mi kaptiĝis de ekscito, pensante al la ĵus legita ekzemplero de 'Al Toronto', kuŝanta en la brustpoŝo de mia surtuto. Ĉu tuj, nun, mi konigu ĝin al li? Mi konsideris la aferon, ĉu nun liveri al li la volumon, aŭ ĉu ankoraŭ, almenaŭ ĝis la morgaŭo, egoisme, nejuste, teni al mi tiom da beleco. Mi bildigis al mi lian plezuron, lian entuziasmon, lian dankemon. Granda estis la tento, premi la verkon en liajn manojn, diri: "Jen, Joĉjo, jen la plej alta belo, la plej simpatia kompreno, laŭ niaj vidpunktoj!"; sed ne, ankaŭ por tiu nokto mem, por relego en la propra lito mi volis konservi ĝin. Efektive, mi ne agas nelojale al li, almenaŭ pri tio mi provis konvinki min.

Ni marŝis sen pluaj vortoj en la stacidomon tra la flankenirejo.

Estis preskaŭ senhome. Ni vagis tra la granda korto, preter la atendsalonon, kie ni sidis post la lasta danco en Westminster, kiam ni akompanis la fraŭlinojn Brett al ilia vagonaro, la vesperon kiam Joĉjo ŝajnis ne scii, kio estas kamizolo, kaj Anjo proponis klarigi al li la aferon, por reciproka informo pri tio, ĉu la famo veras, laŭ kiu li ne portas kalsonon, eĉ dum vintro! Preter kajo ok, kie en 1926 ni renkontis la du germanajn samideaninojn vojaĝantajn al Edinburgo, kun kiuj ni pasigis bonegan amuzvesperon en Londono.

Ni rigardis la grandan horloĝon, sub kiu mi renkontis tiom ofte lin kaj aliajn geamikojn.

"Dek antaŭ la noktomezo?"

"Jes, tio lasas al mi tempon – je kvarono post, la lasta foriras."

"Do, restas tempo por kaffrinko."

"Jes, li ridetis, "ne necesas timi, ke altoficisto de mia firmo vidos min tie!"

Ni ambaŭ ridis. Vere, kiam mi pensas al la lokoj, kiujn ni frekventas! Kiujn nia amikeco beligis. Ni eniris, mendis kafon, rigardis kun amuzo la brunan fluidaĵon kiun oni metis antaŭ nin.

Mi donis al li la sukerojn. "Ĉu vi rimarkis tiun fraŭlinon kun kiu Mason dancis unufoje, tiun kiu portis verdan robon?"

Liaj lipoj ekmoviĝis de ekstazeto. "Belegan korpon ŝi havas, jes. Kaj kiel ŝiaj haroj kuŝis sur la nuko..." Ni sidis silente, bildigante ŝin al ni denove.

"Sed se oni volas paroli pri kruroj..."

"Nu?" mi diris, trafante liajn okulojn, ridetantajn de ĝojo. En nia rondo, oni ŝercas pri Joĉjo, ke se oni volas havi juĝanton pri kruroj...

"Ĉu vi ne vidis?"

"Multajn," mi ridetis, "sed... tiu?"

"Portis arĝentan robon, dancis ĉiam kun tiu judo en la bruna vestaro. Dio, kiom belaj ili estis!"

"Sciu, Joĉjo, estas bela trajto ĉe vi, tiel vi povas paroladi pri la belaj kruroj, kiujn vi vidas, sen la plej eta..."

"Karulo, ĉu vi ne scias, ke jen la sola afero, kiu povus instigi min mem verki poemon?!"

"Ke mi estu permesata legi ĝin," mi diris.

"Se vi estos bona knabo," li amik-incitis.

Tie ni sidadis inter malpuraj laboristoj, aŭskultante senatente ilian obscenan lingvaĵon. Envenis

publikulino, mendis kafon kaj sandviĉon, manĝis kvazaŭ malsata. Kredeble ŝi ja estis. Kontraŭ ni taksiveturigisto grunte leviĝis por pago. Mi rigardis la horloĝon.

"Kvin post noktomezo."

"Bone, ni iru."

Li serĉis monon en sia veŝtupoŝeto laŭ maniero, kiun mi bone konas, maniero, dum kiu li plej bela aspektas. Mi estis jam paginta, metis la manon sur lian brakon, kune ni eliris.

"Nu, jen denove en la arkaĵo. Vi havas tempon?"

"Ĝuste tri minutojn," li respondis.

Ni staris minuton rigardante al la malseka strato, briligata de la reklamlumoj. Mi ŝtelrigardis al li. Tiom bela kaj aminda li aspektis, ke ĉiuj rememoroj pri nia amikeco kunfluis en la menson, pikvibrigante la sangon.

Subita impulso kaptis min. Mi suprenetendis mian vizaĝon al lia, premis liajn lipojn per miaj.

"Do, bonan nokton, Joĉjo, ĝis morgaŭ!" kaj mi forglitis sur la straton, tra la brilo; preter la alumetvendisto.

*

Ĉe renkonto la proksiman tagon li neniel ŝajnis ofendita. Li estis en tre gaja humoro, estis trovinta ravan poemon de Bridges, kaj vidinta survoje paron da kruroj... Niaj okuloj ridetante renkontiĝis en amika kompreno.

de **Kenelm ROBINSON** (K R C Sturmer)

Aperis en **Se grenereto**, 1930

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/noveloj/05.html>

Kelkaj historiaj faktoj

-- de Marcel Leereveld el Aŭstralio

La plano estis, organizi en la jaro 1869 grandskalan internacian ceremonion por malfermi la novan Suezkanalon en Egipto. Antaŭe ĉiuj ŝipoj irantaj al Hindujo, orienta Azio, kaj Aŭstralio devis veturi la longan vojon ĉirkaŭ la Bonesperkabo en suda Afriko. Por tiu ceremonio, kaj samtempe por ceremonii la novan Operdomon en Kairo, Egipto, oni invitis la plej grandan operkomponiston, Giuseppe VERDI, komponi operon bazitan sur okazaĵo en la historio de Egipto. Unue Verdi rifuzis, sed post kelkajara premado de siaj geamikoj, li fine akceptis la komision. Sed intertempe oni en 1869 jam malfermis la kanalon kaj la operejon, kaj uzis por tiuj ceremonioj la Verdi' an operon Rigoletto. Oni do decidis okazigi duan ceremonion, en Januaro 1871, sed povis okazigi ĝin nur en Decembro 1871, pro la Franc-germana Milito tiam.

Unu jaron poste la opero montratis en Milano, Italujo, kaj ĝi estis tiom triumfa, ke ĉe la fino Verdi


devis reveni al la scenejo tridek-du fojojn sub grandega aplaŭdo. Cetere ĉe lia funebro ĉeestis pli da italaj kaj internaciaj funebrantoj ol iam funebris por reĝo aŭ alia ŝtatestro.

La opero Aida estas unu el la lastaj operoj komponitaj de li, post tridekkvino da aliaj, el kiuj deko da ili ludatas centojn da fojoj ĉiujare en la mondo, kaj bonŝance ankaŭ en Aŭstralio.

Fonto: **Aŭstraliaj Esperantistoj #451**



Baza Literatura Krestomatio En la novaĵretejo La Balta Ondo dum la tuta aŭtuno ĉiudimanĉe aperas poemoj el la nova, kvara eldono de la Baza Literatura Krestomatio. La dua poeto en nia dimanĉa poezia rubriko estas la pola kemiisto Antoni Grabowski (1857-1921).



En 1886 Grabowski lernis Volapukon kaj aliĝis al la Viena Volapukista Klubo, sed, aĉetinte somere 1887 la Unuan Libron, li baldaŭ tradukis el la rusa en Esperanton la novelon Neĝa blovado de Aleksandr Puŝkin, kiu en 1888 iĝis la unua beletra libro eldonita en Esperanto.

Antoni Grabowski Laŭ la enciklopedio Nia diligenta kolegaro (NDK):

«Kvankam Grabowski verkis malmultajn Esperanto-poemojn, oni konsideras lin “patro de la Esperanta poezio” pro la unua poezia Esperanto-antologio La liro de la Esperantistoj (23 originalaj kaj 87 tradukitaj poemoj), kiun li kompilis kaj eldonis en 1893, kaj pro liaj tradukoj, inter kiuj elstaras la antologio El parnaso de popoloj (1913), kompilita kaj tradukita de li el trideko da lingvoj (kun kelkaj originalaj poemoj), kaj Sinjoro Tadeo (1918) de A. Mickiewicz, kiun li tradukis dum la Unua Mondmilito». (NDK, p. 110-111)

Hodiaŭ ni proponas al vi legi lian poemon Sur unu kordo.

Agrablan legadon!

15 Septembro 2019 de AIKo

SUR UNU KORDO (Defendo de l' rimo)

Sur lir' dukorda, diris oni,
Ne eblas rima son', kaj jen
Pro tio devas takt-bastoni
Antikvajn ritmojn Lafonten'.

Do mi demandas ridetante,
Ĉu ne aperos ankaŭ sen
Ornama rim' estrin' de Dante,
Vestite en ĥiton' aŭ ĥilen'.

Dukorda liro? – Tial zumi
Kaj tinti adasiste mem
Mi devas? Kordojn havas du mi,
Sed fingrojn kvin por kord-ekprem'!

Dukorda lir' ne igas fini
La kanton, se nur en lerneĵ'
De l' granda majstro Paganini
Ni studis diligente plej.

Ŝiriĝis kord'!... Apollo punu
Liriston, se ne scias li
Ludadi plu, sur lasta unu
en tri-kvin-sep-a pozici'!

Senrima kanto estas por mi
Flor' sekigita sen odor',
Aŭtun-arbar' iĝanta dormi –
La muzikistoj flugis for.

Jen fluis riveret' antaŭ mi,
Sed marĉon formas nun, kaj jam
Ne scias murmureti, ŝaŭmi;
Ĝin kovris ia ŝima skvam'.

Kun rimoj dolĉa kant', sen ili
Parol' senmelodia, ĉar
Kiel ĝi povas fajfi, trili
Kun najtingal' en arbetar'?

De l' rim' potencon konas ĉiu,
Ĝi muĝu, fulmu, tondru tuj!
Ekfrapu kor', okul' radiu:
“Antaŭen filoj de l' patruj!”

Sur stel-standardo Majstro-bardo,
Skribante himnon, rimis ĝin;
Esper' sonoru al homar' do
Per rim' en teropartoj kvin!

(1913)

Ĉi tiu poemo aperis inter la 199 verkoj/fragmentoj de 82 aŭtoroj, publikigitaj en la nova eldono de la Baza Literatura Krestomatio (BLK) (p. 22-23), kuneldonita de Sezonoj (Kaliningrado) kaj Litova Esperanto-Asocio en julio 2019.

Legu pli pri BLK <http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga121.htm>

Aĉetu ĝin kontraŭ 27 eŭroj en la libroservo de UEA.
Legu pli pri Grabowski en la enciklopedio Nia diligenta kolegaro, p. 110-111.

Ĝis la sekva dimanĉo!

AIKo (Aleksandro Korĵenkov)

Fonto: **La Balta Ondo**
<http://sezonoj.ru/2019/09/grabowski/>



Lupo kaj Ŝafido

fablo de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

Malpravas senfortul' konstante en la mond':

La historio ja ekzemplojn multajn donas,
Sed historion mi ne verkas, nek komponas,
Kaj jen pri la afer' de fablo vers-rakont'.

Ŝafid' en varma tag' al rivereto venis,
Sed en la sama lok' malsata Lup' sin trenis.

Manĝaĵon serĉis li kun sanga avided'.

Veninte al viktim' indignon li mienis,

Kun la aspekt' de just' kaj leĝa dec';

"Ĉu rajtas vi, fripon', per la muzel' malpura

Trinkaĵon mian leki en river'

Kun senmoder'

Kaj malpurigi ĝin per ago aventura?

Pro tia malhonesta rab' Vi restos sen la kap'."

"Se Granda Lupa moŝt' permesos,

Mi diros en humil', ke trinkas mi kun paco

De lia moŝta lok' je granda interspaco,

Kaj vane li insultas kaj ekscesas:

Ne povas kaŭzi mi malbonon nun por li."

"Do primensogas mi!

Kanajlo, sentaŭgul'! jen kia aĉa faro!

Memoras mi, ke en pasinta jaro

Arogis vi tutsame sen ĝentil':

Mi ne forgesos tion kun facil'!"

"Pardonu, tamen mi eĉ tiam ne ekzistis."

"Do estis via frat', al vi similas li."

"Ne havas fratojn mi." — "El via famili'

Ja estis iu ajn", indigne li insistis:

"Ja tuta via gent', paŝtistoj kaj hundar'

En la koler' al mi sendube tre similas

Kaj ofte laŭ eblec' malice malutilas.

Al vi nun estas venĝ' por tuta aĉa far."

"Ĉu kulpas tion mi?" — "Silentu!>

Lupo diras:

"Min tedis la diskut', laciĝis jam orel'.

Plenkulpa estas vi, ĉar manĝi mi deziras."

Kaj Ŝafon trenis for la Lupo en kruel'.

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio

tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)

Ukrainio



PEGAZO

verkis Klara Ilutoviĉ el Rusio

*Kvazaŭ veninte el sorĉoj de l' mito,
Kiel altire potenca profet',
le festa lumo por laca spirito
Ravas Pegaz' en la fluga impet'.*

*Baŭmas Pegaz', flirtas liaj flugiloj,
Estas li tuta l'anima elan'
En antaŭlongaj magiaj vivbriloj,
En hodiaŭo de l' vivocean'.*

*Petus mi lin, la stalonon flugpovan,
Pri la enkore brulanta dezir':
Per sia hufo elbatu li novan
Fonton por la poezia inspir'!*



verkis **Klara Ilutoviĉ** el Rusio
foto de **Lenke Szász** el Rumanio

Rimarko : Lenke Szász dum sia vizito al Kuşadası en Turkujo ĉijare fotis la statuon de Pegazo survoje en Lapseki urbeto, la ŝiphaveno en la azia parto ĉirkaŭ la kolo de Dardaneloj aŭ Çanakkale urbo nuntempe. La antikva nomo de la urbo ĉi tie estis Lampsakos kaj sur la moneroj de la urbo iam troviĝis la bildo de Pegazo. Pro tio oni konsideras, ke la simbolo de Lapseki urbeto estas Pegazo.



Japanio estas la sola lando, kiu suferis pro atombomboj, tial multaj japanoj opinias, ke Japanio devas gvidi la mondon al sennuklearmila mondo, ratifante “la Pakton pri malpermeso de nukleaj armiloj” adoptitan en la Unuiĝintaj Nacioj la 7an de julio 2017.

Tiu pakto estis malfermita por subskribo la 20an de septembro 2017 kaj post ratifado de 50 ŝtatoj ĝi ekfunkcios. Antaŭ la 28a de februaro 2018, 56 ŝtatoj subskribis, el kiuj 5 ratifis ĝin. Sed strange Japanio rifuzis subskribi la pakton kun jena preteksto:

“Japanio estas la sola lando, kiu suferis pro la atombomboj, tial ĝi havas la komunan celon aboli nukleajn armilojn. Tamen aliflanke Norda Koreio ekspluatas nukleajn armilojn, kaj tio estas tre serioza kaj urĝa minaco al paco kaj stabilo de la internacia mondo. Al la landoj kiel Norda Koreio, ordinara armiloj ne efikas, tial Japanio bezonas subtenon de Usono, kiu posedas nukleajn armilojn, sub la koalicio inter Japanio kaj Usono.

Se Japanio tuj ratifos la pakton, kiu malpermesas nukleajn armilojn, tio damaĝos justecon de la nuklea politiko de Usono kaj danĝerigos la vivon de la japanoj. “

Kontraŭ la japana registaro multaj homoj protestas. Precipe tiuj, kiuj postvivis la atombombadon en aŭgusto 1945, forte deziras, ke Japanio ratifu la pakton. Hodiaŭ mi tradukos spertojn de atombombitoj en Hiroŝima kaj Nagasaki el artikoloj aperintaj en ĵurnaloj.

verkita kaj tradukita de **Hori Jasuo** el Japanio

2) Unufoje mi forviŝis la atombombon el mia memoro



verkita de s-ino Jamaguči Kazuko 91-jara, loĝanta en Nagasaki, tradukita el la artikolo de la ĵurnalo Asahi la 10an de aŭgusto 2019



La 9an de aŭgusto 1945 mi estis 17-jara kaj mi laboris en fabriko de Micubiŝi en Urakami, Nagasaki. Kiam mi sidiĝis ĉe mia tablo, mi ricevis fortan lumon. Kiam mi elrampis el la detruita konstruaĵo, ĉio ŝanĝiĝis ekstere. Fajrego kaj nigra ĉielo. Vunditoj kun starantaj haroj, kun sango el la kapo

En la rifuĝejo mi aŭdis, ke neniu pluivivis en mia distrikto. Poste mia juna fratino 11-jara estis trovita morta hejme, kaj la patrino kaj la fratino 14-jara malaperis. Mi neniam havis informon pri ili. Mia patro jam june mortis, Mi havis peksenton pro tio, ke nur mi pluivivis, tamen mi decidis antaŭeniri, forgesinte la atombombadon. Mi neniam parolis kun miaj samklasanoj pri mia sperto pri la atombombo.

30 jarojn poste mi komencis retrorigardi la pasintecon. Mi havis presejon kaj foje legis tesktojn pri la atombombitoj, kaj rememoris miajn gepatrojn kaj fratinojn. Mi opiniis, ke tia tragedio neniam ripetiĝu. Lun tagon, kiam la ĉielo estis same bela kiel tiu tago, naskiĝis poemo en mia koro.

*34 jarojn post tiu tago
mi dankas al la blua ĉielo,
ĉar nun ne estas milito en Japanio.*

*Kiam estis milito,
homoj ne povis dormi eĉ en nokto,
timigitaj de sirenoj pri aeratakoj,
pasigis mallumajn noktojn en ŝirmejo,
ne havante manĝaĵon por malsata stomako,
krom taso da supo kiel akvo kun folioj de batato.*

*Tamen homoj iris al batalkampoj
ne nur patroj, sed ankaŭ filoj,
kun peza paŝo por mortigi homojn.
Knabinoj 15-jaraj faris armilojn
per fajliloj tagnokte por mortigi homojn.*

*Kaj en la varmega tago kun brila suno
estis faligita unu atombombo
sur Urakami en la urbo Nagasaki.
Ĝi eksplodis kun lumego, varmego kaj ventego,
kiujn neniam antaŭe homoj spertis.*

*Membroj de miloj da homoj disiĝis,
intestoj elfluiĝis,
vermoj rampis sur la haŭto.
Vivantoj serĉis siajn familianojn,
trovis iliajn kadavrojn kaj bruligis.*

La Titaniko de la movado jam longan tempon subakviĝas, sed tio apenaŭ estas kulpo de iuj konkretaj esperantistoj, des malpli de la foririnta UEA-estraro. La “bona malnova tempo” de la Esperanto-movado estas for, kaj nova tempo pli sukcesa malverŝajne venos, opinias Grigorij Arosev.



Willy Stöwer: La pereado de Titanic.

La Esperanta mondo en tiu formo, en kiu ni ĝin konis dum la lastaj jardekoj, venas al sia fino, eble eĉ jam venis. La subite akriĝintaj diskutoj pri la sorto de la Jarlibro, Centra Oficejo de UEA, la konvulsia kaj absolute sensenca altigo de la UEA-kotizoj, la komato de TEJO, la morto de plurdekoj da fakaj kaj landaj sekcioj-asocioj — ĉio ĉi estas parto de tutmonda procezo, kiun oni apenaŭ rajtas nomi “krizo” — ĝi estas kompleta malapero.

Oni devas esti honesta kun si mem: la “bona malnova tempo” de la Esperanto-movado estas for kaj neniam revenos. Ĉu venos nova tempo? Ne nepre ne, tamen surbaze de tio, kion ni konstatas de jaro al jaro, la organizita Esperanto-movado evidentiĝis esti plene nekapabla adaptiĝi al la moderna mondo. Ankaŭ tion oni devas diri sincere kaj klare, ja se estus alie, ankaŭ la situacio estus alia.

Kion certe ne indas fari, tio estas kulpigi la foririntan UEA-estraron kaj ekzemple ties prezidanton Mark Fettes. Li, tre kapabla kaj estimata movadano, malbonŝance por si ekgvidis UEA-n en la plej malbona periodo, kiam iĝis tutklare, ke la antaŭaj modeloj ne funkcias, sed la novaj jen ne ekzistas jen ne estas realigeblaj.

Fettes povus fari multajn aferojn alimaniere, pli bone kaj pli akurate, sed certe li, nur unu homo, ne povis elakvigi la preskaŭ dronintan Titanikon — Titanikon, kiun persiste celis dronigi amaso da homoj. Ĉu iu alia kiel prezidanto povus savi la situacion kaj post la eksprezidantiĝo lasi la asocion en malpli

senesperiga stato? Probable, sed ĉiukaze estus ne esence pli bone.

Laŭ mi, la gvidantoj de la movado ege subtaksis kelkajn minacojn kaj perspektivojn kaj inverse supertaksis kelkajn fenomenojn. La gvidantoj estis multnombraj, tute ne necesas mencii konkretajn nomojn. Praktike respondecas ĉiuj, kiuj rajtis je signifaj decidoj ekde proksimume 1990, kaj ilia strategia blindeco ne permesis al la movado evolui kaj eviti la nunan staton.



Grigorij Arosev

Plej grave subtaksita estis la falo de intereso al Esperanto, kio siavice estas kaŭzita de la tutmondiĝo, la fulmrapida evoluo de la interreto kaj la domina disvastiĝo de la angla lingvo.

Nur eta malplimulto rilatas al Esperanto kiel al io kara (mi mem estas el la malplimulto, cetere), kaj ajna aktivado estas signo de ĝuste tia rilato. Sed kiom da esperantistoj aktivas? Miloj en la mondo. Nepre ne dekmiloj. Kiom da vivantaj homoj kun iu ajn sukceso lernis Esperanton? Meĵloŝtona demando, sed certe multoble pli ol la kvanto de la aktivantoj.

Plejpartego de la eventualaj konantoj de Esperanto rilatas al la lingvo tre utilece: se oni povas atingi siajn celojn (tramonda komunikado, akirado de informoj, vojaĝoj) pli facile ne lernante la novan strangan lingvon kaj ne profundiĝante en ties kulturon, kial lerni ĝin? La samo rilatas al la jamaj esperantistoj, kun la precizigo ke oni ne volas daŭrigi la uzadon de la lingvo se oni ne vidas realan utilon de tio. Espereble neniu el la racie pensantaj movadanoj kredas ke nun povas serioze temi pri lingva egaleco kaj neŭtraleco kaj ke iu (escepte de eventuale kelkaj individuoj) povas ekardi pri Esperanto pro la menciitaj plene ĥimeraj celoj. Do, la falo de la intereso pri Esperanto estis simple neevitebla, sed oni subtaksis tion.

La neglektado de la interreto estas plia doloro.

La nuntempa stato estas hontinda: ni havas nur kelkajn funkciajn servojn por la tuta Esperanto-

mondo, apenaŭ eĉ kelkdekojn. Pri la “nova retejo de UEA” oni eĉ ne plu ŝercas: la afero jam delonge ne estas ridinda. Sendube iam ni havos ĝin, sed ĝi same sendube je la tago de sia apero jam estos eksmoda (ni esperu almenaŭ ke la servoj funkcios).

Per kio oni povas allogi homojn lerni Esperanton? Per pratempaj libroj? Per malaktualiĝintaj servoj? Per bombastaj sloganoj? Ne! Nur per modernaj retaj servoj, kiuj devas esti liverataj rapide, kvalite kaj kun plaĉa aspekto. Tiaj servoj povus ebligi gajni monon, tamen oni devas investi monon en la projektojn, sed unue — generi ideojn kaj preparoli ilin en eksperta rondo. Estas la jaro 2019. Kiujn taskojn, krom la plej bazaj, havas la nova estraro de UEA? Terminologio. Aktivula maturigo. Scienca kaj faka agadoj. Ĝemelaj urboj.

Kie estas estrarano pri interreto? Pri kontaktoj kun mondaj gigantaj konzernoj, kiujn oni eble povus interesigi pri Esperanto? Pri bitigo de la arkivoj de UEA? Mankas. Mankas. Mankas. Ĉu vere ĝemelaj urboj estas pli gravaj?

La junulara movado estas en multe pli danĝera situacio, kaj la disfalo de la antaŭa konsisto de la TEJO-estraro estas en si mem jam diagnozo. **En ĵusa teksto ĉe Libera Folio** oni povas legi jenon: “Junuloj ne povas plani sian vivon du jarojn antaŭen, kaj tial ne emas akcepti sindevigon por tiel longa tempo”. Tuj aperas demando: ĉu nun la vivo tiom forte malfaciliĝis? Kial pli frue tio (planado de vivo du jarojn antaŭen) estis ebla, kiam estis multe malpli da komunikrimedoj kaj entute malpli da ebloj por aktivado, kaj ne plu eblas nun?

Ne pensu ke mi oldule suspiras pri la “tempoj de nia juneco” — tute ne. Sed estas ja fakto: pli frue

TEJO-prezidantoj kaj aliaj estraranoj ne nur estis elektataj por du jaroj, sed nemalofte ankaŭ restis por dua mandatperiodo. Nun tio restas nur revo. Kial? Verŝajne estas malpli da respondeco antaŭ la movado. Sed eĉ pli verŝajne — simple ne sufiĉas la homaj rimedoj, ne estas sufiĉe da novaj kaj junaj esperantistoj en la mondo. Mian supozon pri la kialoj legu sube.

Sed ĉio supre menciita ne estas la plej granda malfeliĉo. La plej granda estas la manko de rezulto. Iu ajn aktivado de esperantistoj jam delonge havas preskaŭ nulan efikon, ofte la efiko estas eĉ minusa. Oni juĝu laŭ la rezulto(j), nur tio estas la sola objektiva kriterio. Ĉiuspeca agado de esperantistoj estas direktita internen, ne eksteren. En nia okazo tio estas signo de nepra degradiĝo, kiu frue aŭ malfrue eksentiĝos.

Kio venos? Laŭ mi, nenio bona. UEA daŭre pli kaj pli malgrandiĝos kaj perdos pli kaj pli da membroj, sed neniam (almenaŭ dum nia vivo) oficiale malfondiĝos. TEJO plej verŝajne jam baldaŭ ekzistos nur surpapere. Agado en la unuopaj landoj poiome ĉesos, eble post paro da jardekoj, sed ĉesos. Malaktiviĝo de la landaj kaj fakaj asocioj estas sekvo de la samo: oni ne vidas progreson, ne vidas celon kaj pro tio malaktiviĝas.

Plej facile estus komenti mian tekston per la vortoj “Ba, estas pesimisma deliro”. Sed se vi ion tian skribos, mi petas ankaŭ plej konkrete klarigi, kio povas esti bazo por pli optimisma rigardo en la estonton.

Grigorij Arosev

Fonto: <https://www.liberafolio.org/2019/07/30/arosev-la-esperanto-movado-pereas/>

Kirill Ŝvedov: “Direktu la agadon eksteren”

-- el Libera Folio

Ĉi tiu artikolo de Kirill Ŝvedov respondas la julian publikaĵon de Grigorij Arosev, kiu, laŭ li, trafe formulis la ĉefan kaŭzon de la nuntempa stagnado de la Esperanta komunumo: “La plej granda [malfeliĉo] estas la manko de rezulto. Iu ajn aktivado de esperantistoj jam delonge havas preskaŭ nulan efikon... Ĉiuspeca agado de esperantistoj estas direktita internen, ne eksteren. ...oni ne vidas progreson, ne vidas celon kaj pro tio malaktiviĝas.”

Tio aspektas ankoraŭ pli mirinda, se konsideri, ke neniam estis tiel favora tempo por Esperanto, kiel hodiaŭ. Homoj, varoj kaj, plej grave, informoj nuntempe povas moviĝi tra la mondo nekompareble



pli facile ol antaŭe. Ĉio ĉi tio, ŝajne, devus krei

fekundan sojlon por florado de la internacia lingvo. Tamen, la Esperantistaro aspektas nekapabla uzi la aperintajn eblojn. Kial?

Mi opinias, ke ĉi situacion kreas tio, ke Esperanto, kiu celas forigi la lingvan barieron, montriĝas mem ŝirmita fare de ĝi de la ekstera mondo. Ajna Esperanta agado povas havi kiel adresatojn nur tre malvastan rondon de samlingvanoj.

Rezulte de tio, homoj kiuj havas entuziasmon, energion kaj ambicion por fari ion sur nivelo konvena al la moderna tempo, trovas en Esperanto nenion interesan; kaj tiuj kiuj jam apartenas al ĝia komunumo, havas neniujn stimulojn por fari ion pli grandskalan kaj kompleksan.

Tamen, jam delonge oni konas ilon kapablan trahaki ĉi nodon. Tio estas multlingva agado, kiu celas nacilingvan publikon en diversaj landoj kaj uzas Esperanton kiel pivotlingvon. La avantaĝoj de ĉi tiu vojo estas jenaj:

1. Tia agado povos kontakti nekompareble pli grandnombbran publikon kaj, sekve, ricevi fortan respondon de ĝi. Ĉi tiu respondo bone stimulos la partoprenantojn de la agado kaj instigos ilin al disvolviĝo, kvanta kaj kvalita.

2. Ĝi kapablos altiri ne-Esperantistajn aktivulojn, kiuj ekvidos en ĝi efikan instrumenton por realigi siajn celojn.

3. Ĝi draste ŝanĝos la publikan aspekton de Esperanto. La fakto ke ĉi tiu lingvo jam utile servas al granda nombro da homoj, kiuj eĉ ne bezonas posedi ĝin, kaj ke oni entreprenas per ĝi ion vere novan, kion ankoraŭ faris neniu, igos ĝin atentinda kaj taksinda pozitive.

4. Ĝi povos formi bazon por enpraktikigo de Esperanto kiel laborlingvo en konkretajn celgrupojn, kies anojn interesos informa interŝanĝo kun alilandaj samokupanoj. Tio estas temo por aparta kaj ampleksa pridiskuto; ĉi tie mi nur notos, ke plej taŭgaj por tio aspektas la areoj de hobiaj kaj nekomerca agado.

Kiu povas esti la unua paŝo sur ĉi tiu vojo? Ekzistas nemalmulte da kreivaj homoj, kiuj faras, individue aŭ kolektive, diversspecajn informajn kaj artajn verkojn kaj publikigas ilin en la interreto. Kun helpo de pivotlingvo ili povos tre forte vastigi sian spektantaron kaj ricevi respondon fare de alilanda publiko kun alia kultura fono; tio estos por ili nova kaj interesa sperto.

Krome, tio povos rezultigi ankaŭ praktikajn avantaĝojn (utilaj kontaktoj, mendoj, enspezo per

reklamo en jutubaj kanaloj kaj aliaj). Do, ekzistas neniam kialoj por supozi, ke ili ne emos al tiaspeca kunlaboro, se oni proponos ĝin al ili. Ĉio dependas nur de nia flanko.

Koncepto de tia kunlaboro, miavide, povas aspekti jene: laŭ interkonsento kun aŭtoroj de interesaj videoj ĉe Jutubo oni aldonas al tiuj subtekstojn kaj priskribon en multaj lingvoj, tradukitajn per Esperanto. La priskribo enhavos ligilon al retejo de la projekto, kie oni trovos katalogon de tradukitaj videoj, similan al tiu de Tubaro.

Certe, oni selektu por la kunlaboro nur enhavon vere altkvalitan, "kremon". Kiel specimenon de tia, mi povas nomi, ekzemple, ŝikvidan dokumentan filmon pri Sergej Prokudin-Gorskij, unu el la pioniroj de kolora fotado.

Do, espereble, mi sukcesis montri, ke Esperanto havas ŝancon esti hodiaŭ ne postrestaĵo de jam delonge pasinta tempo, sed pioniro, kiu malfermas novajn vojojn al interhomaj kontaktoj en la nuna "tutmondiĝinta" epoko. Ja ĝuste por tio ĝi estis kreita.

Kirill Ŝvedov

Fonto: <https://www.liberafolio.org/2019/11/04/kirill-svedov-direktu-la-agadon-eksteren/>



La suna urbo

Se oni planas viziti aŭ gastu en apudmara regiono, la plej allogaj estas la suno kaj la vidindaĵoj. La urbo, priskribita sube, havas la ambaŭ. Fakte ĝi estas la plej suna marferiejo en Anglio.



Bognor Regis ĝuas averaĝe 1921 horojn da sunbrilo jare. Ĝi tenas la jaran rekordon pri sunbrilo kun 2237 horoj, registritaj en 1990 jaro.

La urbo situas en la sudo de Britio apud la Angla Kanalo en graflando West Sussex. La loĝantaro, inkluzive de Felpham kaj Aldwick, estis 63.855 en 2011 jaro.

Bognor estis unue registrita en dokumento de 680 p.K. kiel "Bucganora". En malnova angla, "Bucge" estis la nomo de virino (verŝajne terposedanto) kaj "ora" signifas "bordo" (ĉi-kaze strando aŭ tereno).

Sir Richard Hotham (1722-1799) venis al Bognor en la dua duono de la 18-a jarcento kaj komencis krei marferiejon el la malgranda fiŝkaptista vilaĝo. Lia loĝejo estas daŭre videbla hodiaŭ en la bela Hotham Park.

En 1929, post kiam reĝo George V restis en Craigweil House por resaniĝo post malsano, Bognor ricevis la nomon "Regis".

La Loka Historia Societo de Bognor Regis (LHSBR) estis fondita en januaro 1979 de K.R.Crum. Ĉiumonate ĝiaj membroj kunvenas en unu el la kulturaj centroj de la urbo kaj ĝuas interesajn prelegojn. La kunvenoj estas malfermitaj por la tuta urbanaro kaj gastoj de la urbo. LHSBR organizas diversajn aliajn kulturajn eventojn dum la jaro.

verkis kaj sendis Hasan Hasan, el Anglio

En 1984 jaro LHSBR fondis muzeon en la urbo, unue en Park Lodge, Hotham Park, poste en 1997 jaro sur High Street 69 kaj nun en la iama Berkeley Arms sur West Street. Ĝi estas en ĉi tiu konstruaĵo ekde 2011 jaro kaj estas administrata de la societo.



La muzeo estas malfermita por vizitoj de aprilo ĝis novembro. En ĝi oni povas vidi tre interesajn ekspoziciojn, aĉeti diversajn suvenirojn, librojn pri Bognor Regis kaj ĝia regiono.

Eble estos interese menciiti, ke la eniro estas senpaga kaj la homoj, kiuj gastigas la vizitantojn en la muzeo, estas volontuloj. La donacoj de la loka komunumo estas grava enspezo, kiu helpas teni la muzeon malfermita.


Kiam vi planas vidi la sudon de Britio, Bognor Regis estas neevitebla vizitcelo. Tie vi povos trovi krom la muzeon, multajn aliajn interesajn vidindaĵojn, amuzejojn kaj feriejon. Se vi ŝatas surfi por pli da informo www.bognormuseum.org estas rekomendinda retpaĝo.

Atentigo: La nomoj de iuj lokoj kaj personoj en la teksto ne estas esperantigitaj.

La teksto estas kreita surbaze de indikitaj fontoj:

1. Bognor Regis Lokal History Society: Celebrating 25 Years 1979-2004
2. Sir Richard Hotham (1722-1799) Founder of Bognor as a Seaside Resort
3. Bognor Regis Local History Society-newsletters
4. www.bognormuseum.org
5. <https://www.quora.com>

verkis kaj sendis **Hasan Hasan**, el Anglio



Li posedas multe da rizejoj, sed malmulte da klereco. Iun tagon, kiam li akceptas vizitantojn, lia servisto alportas al li unu leteron:

Jen letero de la Kantonestro!

Ne kuraĝate konfesi antaŭ la ĉeestantaro, ke li ne scipovas legi, li malfaldas la paperfolion, ŝajnigas, kvazaŭ li rapide tralegus ĝin perokule, poste diras:

Venigu la mesaĝiston!

Tiu-ĉi alvenas kaj ricevas la ordonon:

Vi iru diri al Sinjoro Kantonestro, ke mi konsentas

veni ĉe li post momento.

Mirkonsterniĝo! La kuriero gratas al si la orelojn kaj respekte respondas:

Mi ne scias, ĉu vi jam klare legis, kion skribis mia mastro. Li simple petas vin pruntedoni al li vian virĉevalon!

Eltiraĵo el **Ridi Vjetname**, eldonita en 1981 de Fremdlingva Eldonejo.

Fonto: <http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/ridi-vjetname/la-mesagxo/>

Vortareto

- * **Kantono** - ĉina havenurbo (113°17'E, 23°10'N).
- * **klera** - kapabla, per ĝusta uzado de akiritaj scioj, klare juĝi kaj bone taksii la aferojn.
- * **klereco** - eco de iu klera.

* **kuriero** - homo, kies okupo estas rapide porti korespondaĵojn, piede, surĉevalo aŭ alie.

* **rizejo** - subakvigebla kampo, en kiu oni kulturas rizon.

* **rizo** - unujara tropika, marĉa herbo (*Oryza sativa*), grava grenspeco.

La certa vojo al la koro de virino

Onidire sur la plej alta montopinto de Tibeto vivas la plej saĝa homo de la mondo. Foje venis al li junulo por ekscii, kiu vojo kondukas al la koro de virino ekamita.

-- Diru al mi, majstro de l' majstroj, kiu estas la plej mallonga kaj plej certa vojo al la koro de virino?

La majstro respondis:

-- Ne ekzistas certa kaj rekta vojo al la virina koro, fileto; nur apudravinaj padoj -- sen mapo kaj kompasoj vi devas marŝi sur vojoj plenaj de rokoj, domozaj arbustoj kaj krotaloj.

-- Sed majstro, kion fari por konkeri la koron de la amatino?

-- Kara mia disĉiplo! Notu bone, ĉizu en la cerbon kaj koron miajn instruojn kaj admonojn!

Purigu la dentojn!

Ne skrapu la skroton antaŭ ŝi!

Portu al ŝi florojn kaj multe-multe da donacoj!

Antaŭ ol urini levu la sidplaton de la necesujo, kaj poste ne forgesu ĝin refaldi.

Lavu al vi la manojn antaŭ ol elveni el la necesejo!

Ne manĝu ŝmacante!

Ne ruktu laŭte, prefere neniam ruktu!

Ne furzu!

Ne parolu malbele pri ŝia patrino, amu ŝin same, kiel vian propran patrinon!

Ne blasfemu!

Ĉiam ridu pri ŝiaj malbonaj ŝercoj!

Ne ĵaluzu pri ŝi, se tamen jes, nur iomete!

Lasu, ke ŝi ĵaluzu pri vi! Ŝi rajtas.

Ne kreskigu barelventron! Eĉ, neniam dikiĝu! Sed ŝi rajtas! (Tamen neniam diru al ŝi!)

Ne restadu longe en la banĉambro!

Ne lasu la viŝtukon sur la planko!

Neniam diru al ŝi, ke ŝi ne povas stiri!

Ne malfrue venu hejmen! Ekirinte el la laborejo tuj iru hejmen!

Ne amuziĝu kun la amikoj! Prefere ne havu amikojn!

Ne revu pri amikinoj!

Ne algapu, eĉ ne menciu la mamojn kaj pugon de ŝiaj amikinoj!

Ne estu avara! Uzu po du banko- kaj kreditkartojn!

Ne alrigardu aliajn virinojn! Eĉ komprenu nun por ĉiam, ke aliaj virinoj eĉ ne ekzistas!

Ne parolu pri via eksamikino! Vi neniam havis iun antaŭ ŝi!

Minime po 24 fojojn tage diru al ŝi: "Mi amas vin!"

Spertiĝu kiel kuiristo!

Lavu la vazojn, kaj la kuirejon tenu pura!

Rearanĝu la liton (ĉiam)!

Alvoku ŝin telefone, kie ajn vi estas, kaj kiel ajn vi estas okupata!



de Jevgenia Sorokina, el Rusio

**Peceto el la libro
"ILI VIVIS SUR LA TERO
– ok jaroj da migrado ĉirkaŭ nia planedo"**

geedzoj Maryvonne kaj Bruno Robineau

En Subotica, Jugoslavio, eta kaj maljuna blankbarba sinjoro akceptas nin en stranga domo-muzeo. Nia gastiganto aspektas kiel honorinda profesoro emerita. Kaj tamen, Tibor Sekelj, 75-jara etnologo, vojaĝanto, verkisto-ĵurnalisto, delegito ĉe Unesko kaj esperanto-parolanto, pasigis preskaŭ kvindek jarojn de sia vivo trairante la mondon. Li renkontis kanibalajn tribojn, apenaŭ eskapis la kaptranĉistoj en Borneo, fariĝis jogano kaj kvietigisto de serpentoj en Hindio, frandis ter-vermojn kun la indiĝenoj de Nov-Gineo, kaj tiel plu kaj tiel plu... Li verkis tridekon da librojn pri sia aventurplena vivo, tradukitaj en plurajn lingvojn, inter kiuj japanan. Solida poligloto, li lernis ne malpli ol dudek kvin lingvojn dum sia vivo. Li nun flue parolas naŭ el ili kaj estas i.a. membro de la Akademio de Esperanto.

Lia domo estas vera muzeo de memoraĵoj pri liaj aventuroj. Ni dormis en ĉambro, kie maskoj de la kvar anguloj de la mondo rigardis nin de ĉiuj muroj per strangaj grimasoj.

„Nun kiam mi estas maljuna mi povas de pli fore taksi mian vivon kaj fari sintezon. Mi konstatas, ke fakte tra miaj aventuroj mi provis pli bone koni la homojn, kompreni ilin super eventualaj malsimilaĵoj, kaj atingi interamikiĝon. Komprenoble, la kap-

tranĉistoj provis mortigi min, sed tio ne pruvas, ke ili estas malbonaj: simple ili obeis iajn praaĵn leĝojn, kaj tio neniel malgrandigas mian amikecon al ili. Neniam mi ekiris kiel konkeranto, sed ja kiel amiko vizitis la montojn, la dezertojn, la kanibalajn tribojn, la diversajn popolojn. Se ili ne akceptis min, tio signifas, ke ili ankoraŭ ne pretis: mi devis atendi ĝis ili malfermiĝos... Kaj mi precipe lernis, ke la eksteraĵo neniel gravas; gravas la homa animo, sub la militaj farboj, malantaŭ la kutimoj kaj la moroj, kiom ajn fremdaj unuavide por eŭropano.“



Tibor Sekelj plu agemas malgraŭ sia granda aĝo. En 1985, dum la ĝenerala Sesio de Unesko en Sofio, li sukcesis adoptigi tre pozitivan oficialan deklaron por Esperanto. Krom siaj agadoj en la esperantomovado, li ofte ricevas invitojn por prelegoj, kies centra temo estas la amikeco inter la popoloj. Vere tre simpatia kaj stimula halto por vojaĝantoj! Ne necesas diri, ke Tibor Sekelj forte kuraĝigis nin por nia entrepreno.

Post petvetura trapaso de Jugoslavio sub la neĝo, jen ni ree en Ateno por aviadile iri al Hindio, al Azio, al alia mondo, kiun ni antaŭ longe deziris koni.

La unuan de januaro, ni simple bondeziris: 1987 estu tiel riĉa kaj feliĉa kiel 1986.

Ateno, januaro 1987.

La libron vi ankaŭ povas legi en ĉeĥa lingvo, danke al laboro de J.Drahotová.

...en la Istanbul-a Maratono

Mi volas informi vin, ke en la 3-a de novembro dimanĉe mi kuris kadre de la Istanbul-a Maratono 15 kilometrojn en t-ĉemizo de la Esperanto-kurteamo "Paŝo Post Paŝo" - vidu la al kroĉitan foton faritan dum mia atingo de la celo.

Ilia retpaĝaro estas <https://paxopostpaso.wordpress.com> - bedaŭrinde ĝis nun mi ankoraŭ ne sukcesis kuri kun ili.

Amike,
Frank Huber
el Germanio



*Solvo de la
krucvortenigmo*



O	J	E	R	O	H		S	I	E	B	O
N	V	Ĉ	O	V		O	I	D	I	R	I
O	Ŝ	I	F		S	I	K	I	P		N
M	V	R		S	I	D	V	V		O	I
I	K		O	I	R	O	T		O	I	M
T		V	M	T	I	R		O	I	N	U
N	O	I	R	V	B		I	N	R	E	T
V	Ĝ	N	V	Ŝ		O	N	O	G	A	R